


OOMOTO

INTERNACIA



1933

Januaro

Oomoto Centra Oficejo

Kameka Kioto-hu Japanujo

OOMOTO-MOVADO

Deveno kaj Celo: La vorto «Oomoto» signifas Fundamenton. La Fundamenta (aŭ Centra) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris pere de Sinjorino *Nao Deguĉi* sian planon por la reformo de la Mondo. Ni nomas Sinjorinon Nao Deguĉi la «Fondintino» de Oomoto. La Dia Reformplano konsistas en la ekstarigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la Teron. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivigo de la Dia Plano.

Nuna Stato de Oomoto: Post la ĉieliro de la Fondintino, nia movado daŭrigis sian agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro Onisabro Deguĉi, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj sciokaj. La nuna mondo b raktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, so-

le kapabla piloti la ŝipon de la Homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanujo), Lokaj Centroj en Mukdeno, Parizo, San Paŭlo kaj pli ol 1600 filioj ekzistas ne nur en Japanujo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, ĝia internacia monata gazeto «OOMOTO INTERNACIA» aperas en Kameoka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuigas kun Orientaj potencaj spiritmovadoj kiel Tao-Yuan kaj Universalaj Ruĝsvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaj movadoj — Tsaili-Hui, P'uch-Hui, Anĉing-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Novspirito kaj Blanka Frataro en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocion kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondpaco. Ni vokas al ĉiuj tutmondaj gesamideanoj je komuna kunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

KVINTESENCO DE OOMOTO:

Maksimoj:

1. Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respiegulas la *Korpon de Dio*.
2. Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la *Forton de Dio*.
3. Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la *Animo de Dio*.

Ĉefinstruo:

Dio estas spirito loganta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la

mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekstiĝas senlimaj fortoj kaj aŭtoritateco.

Devizoj:

1. Harmonio inter Dio kaj homaro.
2. Instruo pri Dia Vero.
3. Fundamenta moralo.
3. Sankta karaktero de la misio.

Principoj:

1. Pureco de animo kaj korpo.
2. Unuigo inter klasoj de la socio.
3. Optimismo pri la aranĝo de Dio.
4. Progreso por la socia plibonigo.

OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO DE OOMOTO-MOVADO KAJ DE UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

JARO IX

JANUARO 1933

N-RO 1 (89)

Ĉefredaktoro: Koogecu NIŠIMURA.

Redaktoro: Jozefo MAJOR.

Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto.

Pri kotizoj ktp. legu lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Saluto al la Esp-istaro okaze de mia reveno al Japanujo

Post sep jara restado en Eŭropo, laŭ instrukcio de majstro Onisabro Deguĉi, mi revenis al Japanujo. Kun granda ĉagreno mi forlasis Parizon, kie nia Oficejo sidadis dum tiom longa tempo kaj kun bedaŭro mi adiaŭis miajn multnombrajn amikojn ne nur en Parizo sed en ĉiuj partoj de Eŭropo. Sed ĉagreno estis nur unu flanko de mia animostato — la alia flanko estis ĝojo... Ĝojo, ke mi post tiel longa tempo povis reveni al Kameoka kaj Ajabe, la sanktaj lokoj, kie naskiĝis kaj prosperadas nia Oomoto-movado.

La kaŭzo de mia subita forlaso al Eŭropo estas, ke sinjoro Hidemaru Deguĉi, unua adoptita filo de la Majstro kaj prezidanto de UHA en la baldaŭa estonteco intencas travojaĝi la mondon kun mia akompano. La preciza tempo de lia vojaĝo ne estas tamen ankoraŭ difinita, mi do provizore restados en nia Kameoka Centro kaj direktos de tie nian peresperantan fakon.

Sinjoro V. M. Šiskov, eks-sekretario de la Eŭropa Oficejo jam antaŭ kelkaj monatoj reveturis al sia hejmlando kaj nia Pariza Oficejo estas nun fermita. S-ro Simon Frantz en Parizo bonvolas tamen esti nia Rezentanto por Eŭropo, helpata de sinjoroj Archdeacon, Mittey, Le Cornec kaj

Polger, ĉiuj en Parizo, kiel Konsilantoj. Al ĉiuj sinjoroj mi esprimas tie ĉi niajn elkorajn dankojn por ilia helpemeco. Por spari al ili ĝeŝojn, niaj amikoj estas petataj turni sin rekte al ni en Kameoka pri ĉiuj administraj aferoj.

Dum mia sepjara restado en Eŭropo naskiĝis *Oomoto Internacia*, kiu fariĝis jam ĝis nun unu el la plej bone konataj gazetoj en Esperantujo. De nun ĝi estos presata en la nova kaj granda Oomoto-presejo de Kameoka kaj grupo de entuziasmaj kunlaborantoj zorgos, ke ĝi fariĝu konstante pli granda

kaj pli bona. La nuna numero estis redaktita kaj kompostita iom rapideme kaj ĝi aperas malfrue pro la translokiĝo, sed en la sekvaj ni klopodos meriti la aprobon de la afabla Legataro per daŭra perfektigo al la gazeto.

Reveninte al Japanujo, mi vokas al la diversaj spiritaj Movadoj, kiuj bonvolis amike kunlabori kun ni, ke ili daŭrigu sian afablan subtenon kaj marŝu kun ni brako ĉe l' brako al la triumfo de niaj belaj idealoj. Mi vokas al ĉiu unuopa Subtenanto, Abonanto, Leganto kaj Kunlaboranto de niaj UHA gazeto kaj Oomoto-movado, ke ili senlace daŭre apogu nin en nia lukto kontraŭ la mondperigantaj materialismaj tendencoj endangerigantaj la vivon de l' homaro. Ili



S-ro Koogecu Nišimura

neniam forgesu, ke Oomoto estas spirita movado, kiu agadas sub la estrado⁷ de in-spirita Majstro kaj neniam ĉesas progresadi, malgraŭ ĉiuj baroj kaj ŝajnaj stagnoj. En tiu ĉi lumo oni bonvolu konsideri la ĉesigon de nia Pariza Oficejo ne kiel malprogreson, sed kiel unu paŝon malantaŭe antaŭ decida saltö!

En Kameoka atendis min granda surprizo: la tuta loko estas komplete ŝanĝita. La farita progreso kaj kresko estas nepriskribeblaj. Grandaj konstruaĵoj, moderna presejo, muzeo starigis kiel en sonĝo kaj centoj da laboroferantoj tage kaj nokte klopodadas pro la bono de Oomoto-movado. Oficiala alprenado de Esperanto per tia potenco Movado estas tre rimarkinda afero kaj ĉiuj Esperantistoj devus almenaŭ iomete helpi al ni pli disvastigante nian gazeton kiel rekompenco pro la granda helpo donata de Oomoto al la ĝenerala Esp.-movado. Mi estis kompreneble akceptita de miloj da Oomotanoj kiel eble plej frate kaj mia ĝojo estis nepriskribebla kiam je la alveno de la ŝipo sur kiu mi trapasis la oceanojn, centoj da bonvenigantoj akceptis

min, inter ili mia edzino.

Inter la bonvenigantoj kompreneble trovigis kelkaj ĵurnalistoj, kiuj faris al mi demandojn pri la atmosfero en Eŭropo rilate al la politikaj diskutoj ĉe la Ligo de Nacioj pri la japana-ĉina konflikto. La indigno de l' Japanoj pro la manko de kompreno ĉe Okcidentanoj pri orientaj aferoj estas vere tre granda. Unu el niaj plej urgaj taskoj estas do havigi al la homoj tiujn informojn, sen kiuj neniuj juĝo pri ekstremorientaj problemoj povas esti ĝusta.

Okaze de la apero de la januara numero de *Oomoto Internacia* mi kaptas la okazon deziri al ĉiuj Feliĉan Novjaron kaj kvankam mia gratulo venas iom malfrue, ĝi venas tamen el la profundo de mia koro. Al ĉiuj, kiuj min konis en Eŭropo mi diras « ĝis la revido okaze de mia estonta mondvojaĝo kun sinjoro Hidemaru! » Vivu U.H.A. kaj Oomoto-movado! Vivu Esperanto: la lingvo kaj ĝia interna ideo! Vivu Idealismo kaj vivu Spiritualismo: la moderna mondkompreno de la dudeka jarcento!!

Koogecu Nišimura

Grava Sciigo:

Translokigo de nia Eŭropa Oficejo.

Kiel oni legas en la supra saluto, S-ro Koogecu Nišimura (direktoro de nia Eŭropa Oficejo kaj ĉefredaktoro de « Oomoto Internacia ») revenis al Japanujo por akompani S-ron Hidemaru Deguĉi (Vicprezidanto de Oomoto-movado) dum lia baldaŭa vojaĝo tra la tuta mondo. Tial nia Pariza Oficejo translokiĝis al Japanujo.

Dum la foresto, nia fervora kunlaboranto S-ro Simon Frantz prenas sur sin la reprezentadon de S-ro Nišimura. S-ro Simon Frantz (21, Rue Allain Chartier, Parizo) fariĝis nia reprezentanto en Eŭropo pri la Domo de Homamo, Oomoto Internacia kaj Universala Homama Asocio. La konsilantoj kaj konstantaj kunlaborantoj de la Eŭropa reprezentanto estas: S-roj Archdeacon, Le Cornec, Mittey kaj Polgar en Parizo.

Ni do atentigas al niaj karaj gesamideanoj, ke ĉiuj komunikaĵoj, kotizaĵoj ktp. estas denun adresotaj rekte al nia Centra Oficejo, Kameoka, Japanujo.

Kunigo de niaj du organoj. Komence de Januaro niaj du organoj OOMOTO kaj OOMOTO INTERNACIA estas kunigitaj kaj presataj sub la titolo de OOMOTO INTERNACIA, en Kameoka, sidejo de Oomoto Centro. Nia nova serio aperos sur 32 paĝoj, preskaŭ duoble grandaj ol la formato de OOMOTO kaj ĝia enhavo estos tre riĉa kaj interesa. Malgraŭ tiu ĉi pli-grandigo, la abonkotizoj, kiujn oni trovas sur la lasta paĝo, estas la samaj kiel tiuj de la antaŭa OOMOTO. Ni do povas diri, ke OOMOTO INTERNACIA estas la plej malkara kaj enhav riĉa gazeto en tuta Esperantujo.

Ni esperas, ke nia fidela Legantaro juste takos nian oferon kaj bonvolos nin daŭre subteni kaj ni mem klopodos meriti ĝian Subtenon per konstanta perfektigado de nia gazeto.

Kun estimplena saluto,

OOMOTO CENTRA OFICEJO

Rabindranath Tagore kaj Japanujo

Marko Polo

Krom Gandhi estas ankoraŭ unu spirita forto en Hindujo kaj kvankam ĝi estas malpli konata, ĝi ne estas malpli forta kaj profunda: Rabindranath Tagore, aŭ simple Tagore, la filozofa, profeta, poeto, granda gvidanto de Hindujo egale estimata en Oriento kaj Okcidento. Same kiel Gandhi, li ankaŭ majstre uzas la anglan lingvon tiel, ke la okcidenta mondo same atentigas lin kiel la orienta. Tagore ne timas kritike ekzameni ambaŭ orientan kaj okcidentan kulturojn kaj juĝi ilin tute objektivite. Li ne apartenas al tiuj simpluloj, kiuj kondamnas la okcidentan civilizon kiel materialisman kaj laŭdegas la orientan kulturon kiel spiritalisman. Li kontraŭe forte estimas la spiriton de la okcidenta scienco kaj rimarkigas, ke la nuna okcidenta socio kvazaŭ prostituis sian animon, la spiriton de la eksperimenta scienco. Ĉu ne estas vere, ke oni tiras profiton el ĉiuj rezultatoj de la scienca esplorado en Eŭropo kaj Ameriko? Tiu scienca esplorado, tiel seninteresa kaj pura ĉe la grandaj inventistoj kaj scienculoj, estas tuj vendata kontraŭ materialismaj avantaĝoj post la naskiĝo. Se la laboratorio de la pioniro estas la naskiĝloko de iu nova eltrovo, la inĝenieroj, tiuj fervoraj svatistoj, tuj tiras profiton el ĝi. Tio en si mem ne estas nepre malbono sed estas nenormala stato, ke la tuta scienco estu gvidata de l' tekniko kaj la tuta socio movigata de l' profito. Tagore ne timis formuli tiun ĉi kritikon pri la okcidenta civilizo kaj per ĝi li klarigas la moralan malaltecon de la okcidentanoj, kiun ili tiel evidente elmontradis ĉiujfoje, kiam ili kontaktiĝis kun la orientaj popoloj. Ĉar Eŭropanoj venis al la Oriento ne pro seninteresa kuriozeco pri fremdaj kulturoj sed kun la nekasta celo profiti kiel eble plej multe! Kaj eĉ se iuj idealistoj venis kun nobla celo, ĉu ne la komercistoj tuj sekvis ilin kun armeoj kaj aliaj malbenindaĵoj? Certe, la Okcidento montriĝis pli forta ĝis nun sed ĝia forto bazigas sur nura materio: Azio, momente ensorĉita de materialismo, komencas kritike kompari ĝian valoron al la

grandioza kulturo de la Oriento. Oni ne povas regadi la tutan Orienton per nura forto por eterne. Menso, animo, psiko, spirito, koro estas bataliloj multe pli fortaj ol kanonoj, aeroplanoj, ja eĉ gaso kaj mikrobaj bomboj... La Okcidentanoj devus scii tion el sia propra historio: ĉu ne Kristanismo venkis la barbarojn, kiuj estis pli fortaj ol la Roma Imperio? Kiam Azio prenos konscion pri la supereco de sia kulturo, batos la horo de morto por la perforta superregado de l' Okcidento super la Oriento.

Ni vivas en gravega, decida periodo de l' mondhistorio. Estas kvazaŭ ni proksimiĝas al la lasta akto de iu grandioza tragedio. Ĉie en Azio montriĝas signoj de generala rekonsciigo. Ĉu ne ĵus antaŭ nelonge Gandhi venkis la regantan klason de sia lando kaj la britan Imperion samtempe per sia spirita forto, kiam li estis arestita en karceroj? La potenculoj kliniĝis antaŭ la malforta arestito kiu minacis... lasi sin morti pro malsato. Verdire, la horo de juĝo jam estas proksima!

Tagore montras sin granda filozofa, kiam post tiaj konstatoj li elmontras la falsecon de generale akceptita duon-veraĵo, ke la Okcidento detruigos post la leviĝo de l' Oriento. Ne, la fatala antaŭdiraĵo de Spengler* ne estas ĝusta: la leviĝo de Azio, kontraŭe, helpas eliri la Okcidenton el la nuna krizego, kien ĝin puŝis la egoisma materialismo kaj la rabema ekspluatemo kontraŭ la popolamasoj de Azio. Ĉar la t.n. «kolonia politiko» de la Okcidento devigas la ŝtatojn al malsincera diplomatio, al konservado al potencaj marinoj (flotoj), armeoj, kies alta kosto devigas ilin je pli granda kolonia ekspansio, ktp. La nuna ekonomia krizo estas la signo, ke tiu ĉi mekanismo disrompiĝis. Ĉiuj ekonomiistoj de l' mondo ne sukcesos ĝin ripari ĉar ĝi estas kontraŭa al la principo de l' justeco mem. La liberiĝo de Azio de Okcidenta imperialismo estos samtempe la liberiĝo de la Okcidentanoj de l' malbonoj kaŭzitaĵ de kolonia politiko.

Antaŭ kelkaj jaroj Tagore vizitis Japanu-

Ombreloj

E. L. Osmond, London

Vidu la artikolon de Jozefo Major pri «Kasa-Japana ombrelo» en «Oomoto» (Jul.) 1932.
Noto de la Redakcio

La ombrelo venas el Oriento kie la suno brilegas, kie ombro estas tre agrabla. Oni ofte rimarkas en la Biblio, dankajn aludojn al ombrelo. «Li estas kiel ombro de verda arbo en seka, soifanta lando, kie ne troviĝas akvo», estas unu frazo. Aliloke estas, «Ni vivas sub la ombro de la reĝo de Babilono kaj sub la ombro de lia filo.»

Unue, reĝoj en tiaj landoj sidis inter korteganoj sub arboj. En historio ni legas ke kiam Aŭgustino venis el Romo por viziti la reĝon de Kent, Anglujo, en jaro 596, ili sidis sub kverko. Ankaŭ en opero «Lohengrin», la reĝo Popin kaj liaj korteganoj sidis sub arbo.

Poste, kiam la kortego sidis en granda ĉambro, multekostaj arboj el argento kaj oro estis konstruataj super la trono. Sed reĝoj vojaĝis kaj ne povis kunporti tiajn arbojn, do iu elpensis ombrelon por anstataŭi ilin. Oni povis porti ĝin kaj uzi ĝin interne aŭ ekstere de konstruaĵoj. Multaj plendis kiam altranguloj ekuzis ombrelojn. Ksenofono skribis, ke la Persanoj estis tiel virinecaj, ke ili ne estis kontentaj per ombro de rokoj kaj arboj, sed devis porti artefaritajn ombrelojn. Sur Asiriaj kaj aliaj monumentoj oni vidas desegnaĵojn montritajn reĝojn sub ombro.

En 1687, franca nobelulo vizitis Siam'on, kaj priskribis kiel la reĝo permesis al nobeluloj kaj altranguloj, la uzadon de ombreloj.

En la palaca akceptejo la sola meblaro estis tri ombreloj, unu havanta naŭ rondojn, la iliaj havantaj sep. Titolo de «mahrataj» princoj estis «Sinjoro de Ombrelo».

En 1855, la reĝo de Burma priskribis sin kiel «Lia glora kaj supera reĝa moŝto, reĝanta ombrelon-portantajn princojn de Oriento.»

Kupoloj ofte vidataj en Oriento simbolas la saman ideon. Unue uzataj nur super reĝaj palacoj, poste ili estis konstruataj super temploj. Do la kupoloj de S-ta Paŭlo en Londono kaj S-ta Petro en Romo estas parencaj al la modesta ombrelo. Kiel pruvo ke la kupolo devenis el arbo, estas ornamaĵo trovita sur kelkaj kupolaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj pri grapoloj, laŭroj kaj aliaj kreskaĵoj. Oni kelkfoje diras, ke Anglo nomata Jonas Hanway unue elpensis ombrelon, sed en dramo de Beaumont kaj Fletcher, «Estru edzinon kaj havu edzinon», ludata en 1600, oni legas: —

«Nun vi havas ombron, ombrelon,

Por ŝirmi vian reputacion,

De la bruliganta opinio de la mondo.»

Alie angla dramisto, samtempulo, Ben Jonson, skribis en «La Diablo estas Azeno» la jenan, «Tie ŝi kuŝas, plate etendita kiel ombrelo». En angla vortaro de Kersey 1708, ombrelo estis priskribata kiel, «ilo, kutime portata de virinoj por ŝirmi sin kontraŭ pluvo». Je tiu tempo, Jonas Hanway ne estis naskita, sed eble lia pretendo al famo estas, ke li estis la unua angla *viro* kiu portis ombrelon, kaj kiel ĉiam okazas al pioniroj, li ricevis mallaŭdon kaj mokadon.

jon. En la bone konata hindustana revuo «Hitavada» li skribas lastatempe pri siaj tiurilataj impresoj. Kiel li ĝojis, kiam, vidante la fiirtantan japanan standardon por la unua fojo en japana haveno, li pensis ke por la unua fojo en la historio, Orienta popolo sukcesis konkeri la sendependecon per unu giganta fortostreĉo. Sed lia ĝojo ne daŭris longe, ĉar estante filozofo, li daŭrigis la pensadon interne. Japanujo sukcesis bati la Okcidenton... per la okcidentaj armiloj. En tio estus elemento de grava danĝero se ni ne sciis, ke la homoj, kiuj

uzis la okcidentajn armilojn, estis animitaj tamen de orienta spirito. Kaj malgraŭ tio Tagore timas, ke tiu spirito malbonigos uzante *tiajn* armilojn. Ni povas konsenti aŭ malkonsenti; la aŭtoro de tiuj ĉi linioj eĉ malkonsentas kaj kredas, ke la timo de Tagore estas sen fundamento. Sed ni devas ĉiuj saluti en Tagore unu grandan pensulon, filozofon, kiu kvankam orientano, scias sin levi al vere intergenta senpartieco.

* Spengler, germana verkisto postmilita, en sia mondfama verko «La pereco de l' Okcidento» konkludas, ke la Orienta kulturo venkos la Okcidentan kulturon.

Vidu la faktojn pri Ĉinujo kaj Manĉukuo

La sekvan artikolon ni ĉerpas el raporto de H. Gronsitz, Profesoro de Utrechl'a Universitato kaj korespondanto de «Le Temps».

De la lasta somero mi vojaĝis tra Manĉurio kaj Ĉinujo, kaj nun mi estas forveturanta de Ŝanhajo. Ĝis nun mi havis grandan sperton kaj konon kaj mi deziras paroli al vi pri miaj impresoj pri problemoj de Manĉukuo. La ĉefa punkto, kiun mi volas paroli estas pri la du politikaj potencoj de Manĉukuo; la milita klano subtenata de Ĉang kaj lia filo kaj la nuna registaro de Manĉukuo. Oni povas facile scii, ke ambaŭ malakordigas, unu estante anarkiisma kaj la alia naciisma. Ĉinujo estas nuntempe sub la reĝo de senpotenca centra registaro, kiu apenaŭ vivtenas dank' al la delikata ekvilibro inter militaj klanoj, kiuj emas ĉiam kontraŭstari kaj batali inter si. Krom tio la komunismo enkondukita de Suni'hsien havas grandan influon aliparte kaj supozeble ĝi ankoraŭ pli kaj pli konfuzos la tutan landon por longa tempo. Estas malfacile distingi inter bandoj kaj militaj klanoj, kiuj havas neniom da patriotisma sento, nur zorgas profiti por si mem. Kaj la fakto estas, ke la granda amaso de ĉinaj kamparanoj subpremataj de tiu ekspluatema klaso, devas doni siajn produktaĵojn al senpovaj, senkompatemaj politikistoj kaj militaj klanoj, kiuj fakte ne zorgas pri ili.

Nu ni vidu la novan Manĉukuon. Kiu malhelpas la ekziston de Manĉukuo, estas spionoj de Nanking Registaro kaj rajdantaj rabistoj. Supingwĕn kaj aliaj generaloj, kiuj atakas fervojojn kaj turmentas la honestan popolon, apartenas al militaj klanoj, kiuj troviĝas tra la tuta lando kontraŭstarante Chiang Chiekshih. Estas fakto, ke granda amaso da Manĉukvaj kamparanoj suferas nun de ilia senkompatema ekspluatado. Vere estas, ke antaŭ la naskiĝo de Manĉukuo jam estis iu registaro. Mi kredas ke estas necese antaŭ ĉio ekzameni kia ĝi estis. Mi faris tre diversajn demandojn al Ĉinoj de diversaj klasoj; komercistoj, bankistoj kaj eksoficistoj en grandaj urboj de Manĉukuo. La Lytton-Komisionketis, sed oni devas scii ke la respondoj de ĝi kolektitaj entute ne estas kredindaj. Ĉar ili originas plejparte de fideluloj de l'

antaŭa reĝimo.

Notinda fakto estas, ke tiuj ĉi komercistoj kaj oficistoj estas «migrantaj birdoj», kiuj venis de Shantung Duoninsulo kaj tial tuj veturos hejmen, kiam ajn ili akiros sufiĉe da mono. Feliĉe mi havis okazon interparoli ankaŭ kun kamparanoj kaj malgrandaj komercistoj, kiuj okupas la plej grandan parton de la ĉinaj enmigrantoj en Manĉukuo. Iliaj opinioj estas aŭskultindaj koncerne la estontecon de Manĉukuo. Mi vizitis malgrandajn urbojn kaj vilaĝojn de Manĉukuo, ne akompanate de iu Japano, kaj tute senĝene interparolis kun multaj kamparanoj kaj komercistoj. Fine mi scias ke ili elkore bonverigas la intervenon de la japana armeo. En tiuj malgrandaj urboj kaj vilaĝoj, kie mi vizitis, estis intense disvastigita la kontraŭ-japana kaj -manĉukua propagando. Kaj tamen, ĉiuj ĝojis ke ili liberiĝis de la regado flanke de la militaj klanoj. Se oni ne nomas Supingwĕn kaj T'angchüwu banditoj, tio estas granda eraro. Kvankam la motivo kiu pelis ilin al malpacema sintenado kontraŭ Japanujo kaj Manĉukuo ne estas sama kun tiu de banditoj, ĝi estas tute sama en tio, ke la loĝantaro estis turmentata de ili. Ili forprenis grenon kaj varojn kontraŭ falsa mono, dum la militaj klanoj forrabis ilin tute senkompanse. Dum mia vojaĝo, mi vidis per miaj propraj okuloj multajn homojn plori pro malsato kaj malvarmego, perdinte siajn grenojn kaj komercaĵojn. Pro tia malbeninda afero la ĝenerala popolo en Manĉukuo plene konfidis la japanan armeon kaj arde deziras ke ĝi restadu kiel eble plej longe, por ke la militaj klanoj ne sin trudu plu.

Tie ĉi mi atentigas al Eŭropanoj kaj Usonanoj ke ili devas bone noti la faktojn; admiri la falsajn patriotojn de Ĉinujo estas turmenti Ĉinujon daŭrigante la nunan anarkian staton. Pro tio mi profunde deziras ke la japana armeo klopodu forigi ĝin el la lando de Manĉukuo, ĉar tio montros bonan ekzemplon ankaŭ por Ĉinujo. Vere estas, ke ne estas malmultaj en la nuna Ĉinujo, kiuj estas patriotismaj en la vera senco. Mi do esperas ke la estonta brila progreso de Manĉukuo malfermos vojon ankaŭ por ili.

(Decembro 1932)

Trad: K. Hanson

Sankta Skribo de Oomoto-Fondintino Nao Deguĉi

Hidejoŝi Jamakaŝa

Oomoto-movado naskiĝis kun «kamigakari» (dioposedo) de Sinjorino Nao Deguĉi, kiu loĝis en la urbo Ajabe en meza Japanujo. En la nokto de la unua tago de Januaro 1892, ŝi, kiu tiam estis maljunulino 57 jara, vidis mirindan aperaĵon: ŝi vidis multajn Dipalacojn tute solenajn kaj la majestan figuron de Dio, kiuj en nebulo aperis antaŭ ŝi unu post unu. Kun piema koro surprizita ŝi rekonsciiĝis, kaj tuj en la sekvanta momento ŝi estis enĵetita en la staton de Diposedo, nome ŝin posedis la Sankta Spirito. Jen okazis miraklo, ĉar iu interna forto en ŝi devigis ŝin al kriadado kvazaŭ freneze. Kompreneble ŝi ne sciis kial. Ankaŭ la sekvintan tagon la misteraĵo ankoraŭ daŭris. Ŝi estis devigata laŭte kriadi sur stratoj malgraŭ sia volo. La interna voĉo diris pri Dia Entrepreno, pri estonto de la mondo, pri la sorto de la homaro, pri diaj instruoj, pri diversaj multaj aferoj, kiujn ŝi neniam eĉ imagis.

Tio mirigis la urbanojn, sed tiu, kiu plej forte miris, estis ja la bonkora virino mem. Ciel ŝi penis silenti, sed ne povis. Ŝi do ripetis la peton al sia interna voĉo, ke ĝi servigu ŝin per pli milda maniero. Kaj ĝi tuj respondis al ŝi:

«Do vi preparu skribilaron kaj prenu peniketon...»

Tamen, tie ŝi ege embarasiĝis, ĉar efektive ŝi mem estis vera analfabetino. Ŝi demandis:

«Kvankam vi diras, mi tute ne scias eĉ unu literon, kaj plie kiu vi do estas...?»

«Mi estas la Tera Prapatra Dio. Por fari radikalan reformon de l' tuta mondo, Mi nun posedas vin. Ne maltrankviligu. Ĉio estas laŭ Dia projekto. Se Mi uzas vian korpon, kion ajn vi povas fari. Nur estu obeema al Mia ordono.»

Tute obeema ŝi lasis ĉion al Lia ordono, kaj prenis la peniketon. Jen strange, vera miraklo! Ŝia mano subite moviĝis kaj aŭtomate skribis literojn sur la papero tute flue. Kompreneble la skribaĵoj estis neniel kompreneblaj por ŝi, sed obeema kaj piema ŝi neniam kontraŭstaris al Dia Volo. Tute ega-

le ŝu nokte aŭ matene, ŝi ekprenis la skribilon, kiam ajn Dio ordonis. Ofte ŝi vekigis en la meza nokto kaj skribis. Kiel ŝi povis tre bone skribi eĉ en tia mallumo? Tian demandon ŝi respondis kun rideto, ke nenio en la mondo estas nebla, se Dio ĉiopova volas. Tiamaniere la Sankta Skribo de Oomoto fariĝis.

Antaŭ ŝia Diposedo, ŝi devis sintenadi en ĉiuspecaj mizeroj kaj doloroj, kaj vivteni ok gefilojn, kiujn forlasinte mortis ŝia edzo malriĉa. Sed post la diposedo, ŝi estis tiel pia, ke ŝi servadis al Dio senĉese nenion zorgante pri la aferoj de si mem. Efektive en la lasta parto de sia vivo la Fondintino estis ja plena de dieco: ŝiaj haroj tute neĝblankaj, marmore brilanta haŭto; ĉirkaŭ ŝia korpo oni vidis glorkronon, pro kiu ŝi aspektis des pli sankta. Tia stato daŭris dum 27 longaj jaroj, ĝis la lasta momento de ŝia sankta vivo surtera. Tio okazis la 6an de Novembro 1918 (tago de finiĝo de la Eŭropa militego).

Tiamaniere la diaj vortoj fine nombriĝis je 200.000 paperfolioj, sur kiuj estas montrite detale kaj komplete la Vojo, kiun la homaro devas iri, la mistero de la universo, la stato de la spirita mondo, la rilato inter Dio kaj homo, la instruoj koncerne la okazontan grandan reformon al la mondo, senombraj avertoj, antaŭdiroj, ktp. Precipe notinde estas, ke la sanktaj skriboj antaŭsciigis la aperon de granda Dio-homo, la nuna Majstro Onisabro Deguĉi, kiu estas la gvidanto de la homaro kaj samtempe la solvanto, kompletiganto kaj praktikanto de la Sankta Skribo. Kaj la tuta mondo ĉiam iras tute laŭ la skribaĵoj de Oomoto kaj la profetaĵoj efektiviĝadas iom post iom kun absoluta senerareco. Jen estas la rekta manifestigo de Dio mem.

Nuntempe la plejparto el tiuj sanktaĵoj estas zorge konservataj en Oomoto Centro en Ajabe. Pro memoro, la skribilaron, kiun la Fondintino uzis, kune kun iom da sanktaj skribaĵoj oni elmontras en konstanta Oomoto Ekspoziciejo en la Teritorio de Kameoka.



La fama monto «Fuji»

Kion do la Sanktulino efektive skribis? Ĝi estas treege ampleksa, do ni prezentas al niaj legantoj, nur la komencan parton. Oni legu la sencojn kaŝitajn en la frazoj profunde, ĉar la Skribo estas tre riĉa je alegorioj kaj aludoj:

«La tri mondoj, dia, spirita kaj reala sin ekmalfermos kiel prunfloroj en printempo. Venas la epoko de Mia regado. Venas la mondo de Dio, kiu malfermiĝos kiel floroj de prunarbo, kaj eterne prosperos kiel folioj de pinarbo. La mondo ne povas stari sen zorgo de Dio. La nuna mondo estas tiu de bestoj, de perforto kaj de diabloj. La mondo fariĝis tute malluma; la homoj ankoraŭ ne vekigis, dum ili estas perfekte trompataj de diabloj. En tiaj cirkonstancoj la mondo ne povas stari, kaj Dio aperis sur la tero, kaj intencas fari radikalan reformon.

La homoj estu pretaj! Farante lavigadon kaj purigadon al la tuta mondo, Mi tute renovigos ĝin en paco eterna. Fariĝos dia regno por eterne neŝancelebla. Miaj vortoj neniam eraras; eĉ ne je la largeco de unuopa hareto. Se okazus eraro, Dio ne ekzistus en la mondo.

Ĉiuj ĝisnunaj religioj kaj eklezioj estas antaŭirantoj. Ĉe la lasta vico aperis Dio en Oomoto. Okazos malfermiĝo de la Ĉiela Pordego. Ĉiu profeto kaj fondinto de la ekzistantaj religioj sciigis kaj anoncis pri la alveno de la brila epoko, sed tamen neniu

el ili sciis ĝis nun, kiamaniere tio okazos. Vere Mi sciigis al ili naŭdek naŭ procentojn pri la afero, sed pri la lasta unu procento, la plej grava punkto de la Dia entrepreno, ili restas ankoraŭ en ignoro.

Mi estas Dio, kiu scias ĉion pri la tri mondoj. Se oni eksentas solecon en sia spirito, venu al Mi kaj aŭskultu Mian instruon. Tiam oni ricevos Difavoron ĝuste observi kaj kompreni ĉion en la mondo.

Regantoj! Via devo estas senpartie zorgi kaj atenti pri ĉio, ne lasante eĉ la plej malgrandajn aferojn senzorgitaj. Nur la altranga prospero ne sufiĉas por starigi la mondon harmonie. Partiemo neniam alportos pacon al la mondo. Mi konvertos la mondon, por ke la alta kaj malalta rangoj vivu en perfekta harmonio. Sub Mia regado, kiu daŭros por eterne, ĉiuj popoloj havos feliĉon kaj trankvilon. La homoj preparigu! Ŝanĝo okazos tute subite, kaj sekve granda konfuzo.

Estas je Mia granda bedaŭro, ke diabloj arbitre regas la mondon. La popoloj estas ĉiuj blindaj kaj surdaj. Mi ne povas plu vidi ilin trankvile, ĉar la cirkonstancoj estas tiel danĝeraj, kvazaŭ taso starus eĉ la rado de puto.

Satano! Baldaŭ Mi venĝos vin!

Prosperu ambaŭ supra kaj malsupra klasoj. Se nur unu el ili prosperas, la mondo ne povas esti paca! »

Tagigas

De Henry Thomas Hamblin, Redaktoro de "The Science of Thought Review"

La malluma nokto de materialismo forpasadas. La Lumo de Vero kreskas. La tempo venos, kiam malsanulejoj, frenezulejoj, punejoj kaj karceroj ne plu estos necesaj, kaj kiam malriĉulejoj ĉesos ekzisti.

Antaŭe estadis gazeto, eldonita en Londona ĉirkaŭaĵo de iu, kiu vidis per okulo de profeto tiun tempon, kiun tamen li neniam vidis fizike; ĝia devizo estis la vortoj de Jesaja: «Gardisto, kiom da noktoj restas?» La gardisto diris: «Venis la mateno.»

Tiu «tago», kiu nun komenciĝas, estas la tago de spirita lumigo: nescion forpeladas la Lumo de Vero. La vivo sur ĉi tiu planedo estas ŝanĝota, simple per ekkompreno pri la naturo de la Vero, kaj per vivado, agado kaj parolado en ĝia lumokaj povo.

De jarcentoj nescio kaj superstiĉo tenis la homojn en la sklaveco de timo, malsano, mizero, malriĉeco, malfeliĉeco, malĝojo kaj malgajeco. Malpravaj ideoj pri Dio, la homo kaj la Universo kaŭzis la nunan staton de la homo — malsana, difekta, malfeliĉa, malgaja kaj malriĉa, aŭ en spirito, korpo aŭ posedo.

La nova tago komenciĝas ĉar nia koncepto pri Dio, la homo kaj la Universo, rapide ŝanĝiĝas. Homoj ekkomprenas, ke Dio ne estas la kaŭzo, ke Lia popolo estas difekta, malsana, mizera kaj malriĉa. Homoj ankaŭ ekkomprenas, ke Dio ne deziras, ke homoj estu premigitaj de la ŝarĝo gajni vivsubtenon, aŭ preskaŭ ĝis-morte ĉagrenigitaj kaj ĝenitaj de financa zorgo.

Nun la fakto konatigadas, ke Dio estas Dio de Amo; ne, plibone, estas Amo mem. Li estas tiu Amo, kiu neniam pereas, la Amo kiu deziras por ni nur tion, kio servas al nia plej alta bono.

Ni danku, ke lumo venas al homaj spiritoj, kaj kiam iliaj ideoj pri Dio, vivo, homaro kaj la Universo, ŝanĝiĝos, samtempe vivo sur ĉi tiu planedo sammaniere ŝanĝiĝos. La kialo estas, ke la ekstera vivo estas rebrilo de la pensoviivo interna.

Al tiu, kiu eniras en scion pri la Vero, la vivo aliformiĝas. Malsano fariĝas abunda sano; malforteco — povo; malĝojo — ĝojo; malriĉeco — abundo; maltrankvilo — plezuroj, universala servado kaj la pli puraj ĝojoj de pli alta vivo; malamo kaj netoleremo — amo kaj bonvolo. Plie vivo fariĝas superega ĝojo. Oni trovas, ke la Universo konsistas el nepriskribeblaj belajĵoj, ĝis nun ne prisongitaj. Oni trovas, ke ĝin plenigas rido kaj ĝojo, kiu hontigas la malĝojon de homoj. Anstataŭ ke vivo estas malbenita de principo de malbono, oni trovas, ke ĝi estas bona, ĉiam obeanta denaskan principon de bono. Alivorte, oni trovas, ke Dio estas ne nur persono, nek kreitaĵo, nek glorigita homo (ne duone tiel justa, kompatema, bonkora kiel homoj), sed ankaŭ nedevojiĝanta Principo de Bono aŭ Senmankeco, kiu estas Amo mem kaj kompatato ĝis la ekstremo.

Ĉio estas nia. Amataj, NUN estas ni filoj de Dio. La unu en la multaj, kaj la multaj en la Unu. Ni ĉiuj estas partoprenantoj en la universala vivo de Dio. La superega Spirito neniam elpensis malsanon, mankecon, malriĉecon kaj malĝojon; ili formas nenian parton en la Dia Ideo, kiu estas por ĉiam perfekta, senmanka, kompleta. La realeco kaj la efektiva substanco estas amo, harmonio, senmanko, perfekteco, abundo, belo, feliĉo, paco kaj ĝojo nepriparolebla: ĉio alia estas maltrafo al la Dia Idealo.

Iuj diras al ni, ke ĉia suferado kaj malharmonio okazas pro peko. Sed kio estas peko? Homoj pekas pro nescio. Ili ne estas denaske malbonaj nek malvirtaj. Ili deziras agi juste. Ili deziras «ludi la ludon», sed ne konas la regulojn. Ili bezonas lumon kaj komprenon; tial ĉiu leganto de ĉi tiu broŝuro devas veni por pasigi la torĉon al aliaj, same kiel ni pensas, nia parte, pasigi la lumon de l' Vero al vi.

Kiam homoj scios pli bone, ili vivos pli bonajn vivojn, sed ne antaŭe. Ili ne plu estos kontentaj fari «tion», aŭ pensi «ĉi tion» pro obeemo al aŭtoritato. Ili dezi-

ros scii kial, sed eĉ pli ol tio, ili deziros liberigon el siaj suferoj kaj zorgoj. Ili deziros liberiĝi el la inkubo de malsano, suferado, mizero, manko, timo kaj maltrankvilo. Nia misio estas klarigi al homoj la leĝojn de ekzisto kaj montri al ili, kiel harmoniiĝi la leĝojn de vivo, tiel ke malriĉeco, malsano kaj mizero malaperos en la pura lumo de vero kaj kompreno.

Nin ĉirkaŭas kaj trapenetas, do, la ĉieco de Dio. Ni vivas, moviĝas kaj ekzistas en Dio, la sola Universala Spirito. Ni rigardas internen kaj trovas la saman dian ĉeeston kaj diras: «Mia Sinjoro kaj mia Dio.» Ni povas ĉiam fari vivantan kontakton, en la konscio, kun la Plejalta Spirito, Saĝeco, Inteligento, Amo kaj Povo. «Ĉio, kion la Patro havas, estas mia,» diris Jesuo, kaj tio estas vera pri ĉiu el ni. Ni estas malsanaj, infektitaj, mizeraj, aŭ malriĉaj nur pro tio, ke ni ne scias, ke ĉia vivo, sano, abundo kaj ĝojo estas niaj nun; kaj pro tio, ke ni estas interne domo de malakordo, ĉar estas en ĉiu el ni, kiu ne harmoniiĝis kun la leĝoj de estado, konstanta militado, kiu produktas malakordon kaj malharmonion, mankon kaj malordon, ne nur en la korpo, sed ankaŭ en la ekstera vivo.

Harmoniiĝi kun la leĝoj de estado, levigi el la ŝlimejo de eraraj pensoj, en kiu la homo baraktas, kaj atingi tiun altan koncepton pri la reala stato de la homo, kiu estas la vera ideo de Dio pri la homo, ĉio tio estas saviĝo el ĉiuj malĝojoj, el ĉia infekteco kaj malsano, el ĉia malriĉeco kaj manko. Sed pli glorie, multe pli glorie, ol ĉio tio, estas unuigi kun la Plejalta-Amo, Saĝo, Vivo, kaj-Povo.

La granda sekreto de atingo estas forturniĝi de la ŝajna malordo supra kaj establiĝi en Dia estado. Kiel ni jam diris, ni povas je kiu ajn momento tuj kontaktiĝi kun la Plejalta-Vivo, Saĝo, Amo kaj -Povo, utiligante tiujn anstataŭ la malfortaj povoj apartenantaj al nia limigita personeco. Konstatante kaj konfesante Dion kiel niajn vivon, saĝon, kaj sorton, deklarante la veron kaj vivante en ĝiaj lumo kaj povo, per ĉio tio la vivo, sano, senmankeco, perfekteco, ordo kaj abundo de Dio fariĝas niaj kaj montriĝas en nia vivo.

Ĉiu leganto ĉesu pensi laŭ la maniero

de malsano, malriĉeco kaj morto, kaj li diru anstataŭe:

Dio estas mia Vivo; tial mi laboras sen peno kaj sen lacigo.

Dio estas mia Sano; tial mi estas perfekte sana.

Dio estas mia Saĝo; tial mi estas gvidata en ĉio.

Dio estas mia Provizo; tial ĉiuj miaj bezonoj estas abunde kontentigataj.

Ĉiu leganto ne nur pensu tiujn pensojn, sed ankaŭ deklaru ilin aŭdeble, ĉar la parolata vorto havas povon. Li ankaŭ meditu pri tiuj deklaroj de la vero, ĝis ili profundigas en lian subkonscion kaj fariĝas parto de lia vivo mem. Li kulturu novan pensovivon, unue konscian, poste subkonscian, ĉar la unua produktos la duan, se oni persistas en la kutimo de senerara pensado. Ĉiu leganto ankaŭ ripetu tiujn frazojn, fojon post fojo, silente aŭ aŭdeble, ĵus antaŭ ol li endormiĝas, por havi bonan influon sur tiun mirindan internan vivon, sub aŭ preter nia ordinara eksterdorma konscio, kiu modelas aŭ kreas niajn eksterajn vivon kaj kondiĉojn.

La ekstera vivo estas reflektajo de nia pensovivo. Ni altiras al ni ĉirkaŭaĵon konforman al tio, kio ni estas interne. Ĉiu leganto do komencu ŝanĝi sian pensokutimon, konscian kaj subkonscian, uzante diraĵojn pri la Vero, kiuj establos lin en Dio, anstataŭ en erara personeco kaj ŝajno.

(Laŭ afabla permeso de la aŭtoro
elangligis F. W. Hipsley).

Cigaredo

Cent cigaredoj, kiam oni jam sate fumis.

Unu cigaredo, kiam oni ĝin deziregas.

La unu ŝajnas pli havinda, ol la cent.

En la mondo ofte troviĝas aferoj malaj al la supraj kalkulo.

— Hidemaru Deguĉi —

Impresoj pri la Japana Virino

Jozefo Major

«Kia estas via impresoj pri la virino en Japanujo?» — jen estas la iom embarasa demando, kiun mi ofte pozas al mi. Se mi estus hipokritulo, mi povus respondi, ke mi ne multe studis ankoraŭ tiun ĉi demandon — sed post 9 monata restado en Japanujo, mi vere ne povas ŝajniĝi tian ignoremon. Respondi, ke la japana virino estas ĉarma kaj aminda, estus aliparte tro facila solvo — ĉar tiom multe eĉ la plej neinformitaj pri Japanujo Eŭropanoj bone scias. Tial do mi nun iom detale diros mian opinion.

Nepriskribeble granda estas la diferenco inter okcidenta kaj orienta virinoj kaj tute speciale grandega estas la malsameco inter Japanino kaj Eŭropanino (aŭ Amerikanino). Ĉar nur malmultaj virinoj akompanas vojaĝantajn sinjorojn, Eŭropanoj preskaŭ neniam vidas Japaninon, precipe nacimaniere vestitan kaj tiel tute ne konas eĉ pri ŝia ekstera aspekto. Japanoj konas nur supraĵe Eŭropaninojn kaj tute ne scias distingi pri la diferencoj de diversnaciaj virinoj. Sed estas tre grave neniam forgesi, ke en Eŭropo mem loĝas multaj diversaj nacioj kaj la diferencoj inter Francinoj, Germaninoj, Anglinoj kaj Hungarinoj, ekzemple estas treege grandaj. Sed mia tasko tie ĉi ne estas paroli pri Eŭropaninoj, sed pri Japaninoj, do mi revenas al mia temo.

Kiam Eŭropano por la unua fojo vidas Japaninon vestitan per kimono, «obi» (zono) kaj «geta» (lignosandaloj) — li ricevas ian nervan ŝokon kaj havas la impreson, ke tiu sinjorino estas alivestita por kostumbalo aŭ por teatra prezentado. Ĉar okcidentaj virinoj vestigas pli kaj pli simple, la diferenco estas vere okulfrapa. Oni ne devas tamen forgesi, ke en antaŭaj tempoj, Eŭropaninoj havis tre komplikajn kaj multspecajn vestaĵojn kaj nur en la lasta tempo la modo simpligis. Estis tempo en la franca historio — antaŭ ne tre longe, verdire — kiam sinjorinoj portadis largegajn jupojn kun longega pendaĵo, nomitajn «krinolino», kiuj aspektas multe pli komplikaj ol la plej larĝa «obi» portata en Japanujo en la Tokugawa epoko (1603-1867). Aliparte, oni bone scias, ke la japanaj virinaj vestaĵoj ne

ĉiam estis samaj kaj la nuna modo venas el la Tokugawa epoko; aŭ taŭ tiu tempo oni portis nur simplan zonon kaj la «obi» estis ligita antaŭe, ne malantaŭe. Modoj ofte ŝanĝiĝas kaj en la okcidento, kaj en la Oriento, tial ni ne devas tre forte akcenti ilian gravecon kaj ni ekzameni pli volonte moralajn kvalitojn ol eksteran aspekton.

Kiel edzino kaj patrino, la japana virino staras sendube sen rivalo en la mondo. En neniun lando kaj en neniun epoko aperis tia bona virino, kiel la japana. Tiu ĉi opinio ne estas flataĵo, kiun Eŭropano prezentas al japana publiko, por gajni plaĉon ĉe ĝi, sed la ĝenerala opinio de ĉiuj eŭropaj filozofoj, kiuj detale studis pri virina karaktero en Japanujo. Kompare al la energia Eŭropanino, Japanino aperas kiel milda angelino; pacienca, ĉiam afabla kaj cedema, fidela, bonega patrino kaj heroa gardanto de la familiaj tradicioj — la japana sinjorino formas akran kontraston kun la egoisma virinspeco produktita de la mekanika civilizo de la lasta jarcento en okcidentaj landoj. Certe, ankaŭ en la malnovaj landoj de Eŭropo troviĝis tipoj de perfektaj virinoj, sed bedaŭrinde ili jam preskaŭ malaperis — dum la japana virineco vivas, ne-infektita de modernaj malbonaĵoj. Dum tiu ĉi kvalito de virinoj ekzistas, Japanujo ne perdos sian animon!

Oni riproĉas al la Japanino, ke ŝi ne estas tiel amuza, nek tiel memstara, kiel la Eŭropanino. Verdire, unu virina speco ne povas posedi ĉiujn perfektecojn. Sed unu perfekteco estas pli bona ol neniun: la japana virino posedas kelkajn perfektecojn, dum la Okcidentulino en nenio estas perfekta, en ĉio supraĵa. Japana virino neniam altrudas sin, nek ŝi pretendas artojn, kiujn ŝi ne bone lernis. Praktike ilustrante mian ideon, mi povus mencii, ke en Eŭropo, virino ludas ĉefan rolon en la domo: kiam gastoj alvenas, ŝi devas sprite gvidi la konversacion, ludi muzikon aŭ kanti, kelkfoje danci, tenisludi, ktp. Sed plej ofte, ŝia konversacio estas bagatela, ŝia muziko estas turmento por bonaj oreloj, ŝia danco estas mallerta kaj ŝia tenisludo estas karikaturo

de sporto. Certe ekzistas perfektulinoj en Eŭropo, sed kiel mi diris, ekstreme malofte. Nu, Japanino ne pretendas montri tiajn artojn, sed ŝi estas perfekta en sia sfero, ŝi konsciencie purigas la domon, zorgas pri la familio, kaj ĉefe, vivas puran kaj honestan vivon, dediĉante sin por sia misio: la feliĉigo de sia malgranda, homa rondo. Eŭropaninoj, kontraŭe, ofte neglektas sian familion, kaj dediĉas sin al diversaj movadoj. Mi konis Anglinojn, kiuj pasigis sian tempon ĉefe kiel memvolaj laborantoj por kontraŭfumada movado, por kontraŭ-milita asocio, ja eĉ por Esperanto (kiu estas pli laŭdinda okupiĝo, certe!) — sed samtempe ili tute neglektis siajn familianojn...

Japanino neniam pretendas esti rimarkinda individuo. Ŝi preferas rezigni pri sia propra personeco por esti despli perfekta en sia tipo. En Eŭropo nuntempe eĉ la plej vulgara fraŭlino pretendas esti rimarkinda individuo, «tute si mem» — kiel ŝi dirus. Fraŭlinoj ofte studas en Universitato kaj pretendas grandan inteligentecon, sed la vera celo de ĉiuj siaj klopodoj estas kapti edzon. Kiom da laboro kaj mono estas ofte elspezata kaj tamen la rezultato ne atingita; kaj se atingita, la edzina vivo montriĝas fine malsukcesa, ĉar la sinjorino malhavas ĝuste tiujn kvalitojn, kiuj faras bonajn edzinojn kaj patrinojn. Kiom feliĉaj estas multaj Eŭropaninoj, se ili povus rezigni pri siaj stultaj senutilaĵoj kaj imiti la simplecon de l' Japaninoj! Kaj kiom pli facile alvenus edzo kaj feliĉa vivo, se ili tute sin dediĉus al sia natura tasko, sen ĉirkaŭiroj...

Tial, mi pensas, ke Japaninoj prezentas bonegan ekzemplon al Eŭropaninoj, kaj ĉefe Amerikaninoj. La tasko de vera virino estas sin dediĉi al la familio; en la nuna kriza tempo, kiam laboro mankas eĉ por familipatroj, estas hontinde, ke ĉiu fraŭlino en la Okcidento postulu altan salajron eksterdome kaj okaze de neekzisto de laboro — senlaborecan subvencion de l' ŝtato. Aliparte, Japaninoj povas iomete lerni ankaŭ de l' Eŭropaninoj — ĉar el ĉio oni povas instruiĝi, eĉ el malbono. La granda instruo de Eŭropaninoj al Japaninoj estas, ke virino ne devas tute neglekti la socian vivon kaj devas preni sian justan

parton en la grandaj movadoj, kiuj celas la feliĉon de l' homaro. Kiam la patrinoj bone komprenas, ke se ili volas la feliĉon de siaj infanoj, ili devas helpi movadojn kiel U.H.A., Esperanto, ktp, ili tuj aktive partoprenos tiujn movadojn.

Mia opinio pri japanaj virinoj ne estus komplete, se mi forgesus mencii la tute junajn knabinojn. Ili estas la floro de la lando! Nenie en la mondo mi vidis pli amindajn, pli sincerajn, pli varmkorajn estaĵojn ol japanaj knabinoj. Kaj prave estas tiel: ĉar la vera karaktero de iu popolo montriĝas ĝuste en la infanoj, kiuj ankoraŭ ne lernis ŝajnigi sin mem aliaj ol ili vere estas.



Japanana junulino kun pupo.

La plej alta edukmaniero ne estas tiu, kiu kontentigas pri sola perado de scio, sed tiu, kiu kondukas nian vivon al harmonio kun senfino kaj al vivo eterna.

Rabindranath Tagore

Al la Mondo de Bonamo

H. D. Takamizu

Espero kaj Lumo.

Nun la vivado de la tuta homaro sin trovas en ekstrema kriza situacio spirite, same ankaŭ materie. Ĉu ne aperos ie en la mondo tia grandiozulo, kiu gvidos la homaron el la hodiaŭa krizo al nova socio de espero kaj lumo?

Tio estas vera sento kuŝanta en ĉies korfundo. Dronantoj kaptas eĉ peceton da pajlo. En la koro de la homoj jam lacigitaj ĝisoste pro la ĉiutaga vivado ankaŭ troviĝas espero kaj idealo iamaniere trovi la mondon de paco kaj feliĉo. Kiel ĝojos la homaro pro sia reviviĝo, kiam malfermiĝos la Nova Vojo de espero kaj lumo antaŭ ĝi! Ĉiuj homoj estas egale amataj filoj de Dio. Eĉ se diferenciĝas religio, raso k.a., tio tamen estas nenio, ĉar estas esenca afero, ke la homoj estas reciproke gefratoj tute egalrajtaj. La homoj reciproke malamas, ĵaluzas kaj daŭrigas abomenan batalon inter si nur pro malgrandaj individuaj interesoj, sed tio estas granda memkontraŭeco kaj malsincereco. En praestinteco la homaro vivis en la formo de unu granda familia rondo. Sed la homaro komencis kun la tempo forgesi sian veran Patron kaj fine eĉ kontraŭstari al Lia Volo.

«Venus agrable printempo de mondfamilio sur la tero» — tia espero jam fariĝis konsiderata kvazaŭ vanta ŝonĝo de la homaro, kvankam tia espero certe kuŝas ie en la individuo.

Ĉu do tia mondo plena de lumo kaj espero ne efektiviĝos por eterne? Ĉu la homaro devas vagadi sur malluma vojo sencele? Ne, tio povas esti neniel! Venos tagiĝo post nokto, venos printempo post vintro...

Sopiro al la Patro.

Dum la daŭro de kelkmiloj da jaroj la homaro esperis realigon de la mondo de paco kaj feliĉo, kaj tamen tio ne efektiviĝis ĝis hodiaŭ. En la estinteco ja aperis

sanktuloj, kiel ekzemple, Konfucio, Budao, Jezuo, Mahometo, k.a., kiuj fervore klopodis efektiviĝi ĉielregnon sur la tero. Ilia sankta laboro tamen ne plene sukcesis, ĉu pro malperfekteco de la mondo, aŭ pro manko de vera gvidanto de la homaro. La homaro konstante evoluas. Nun la malnova epoko estas forironta kaj tre baldaŭ aperos la nova. La homaro longe atendas la aperon de granda heroo, kiu kapablas ĝin eduki kaj gvidi kiel patro kaj instruisto de l' mondfamilio. La nova sorto de la homaro estas tiu de infano kiu serĉas sian veran patron.

Lumo el Oriento.

Kiel longe la homaro atendas la naskiĝon de granda heroo! Post kiam tiu grandiozulo perfekte sin malkovros, tiam firmiĝos la fundamento de paca kaj feliĉa mondo.

Kristo diris antaŭ du mil jaroj, ke sanktulo aperos en la Oriento kaj ekmovos la mondon. Budao ankaŭ aludis jam antaŭe, ke granda Mesio aperos en nordorienta lando ĉe la mondfino. La persa profeto Abdul Baha' profetis: «Japanujo havos la tempon, kiam ĝi ekbrulos en ardanta fajro. Ĝi havas mirindan kapablon disvastigi dian instruon, ĝi pioniros por vekti spirite ĉiujn popolojn kaj naciojn, kion la tuta mondo baldaŭ vidos.»

«Lumo el Oriento» — tiu frazo nun vekas novan senton en la mondo. En kiu terparto do efektive aperos tiu granda heroo tiom longe kaj arde atendata de la tuta homaro? Laŭ la antaŭdiroj de la sanktuloj, li ja devos aperi el la Oriento, el Japanujo. Se Jes, — kiam kaj kie...?

Universala Homama Asocio

Universala Homama Asocio (U. H. A.) estas fondita, laŭ la iniciato de Sinjoro Onisabro Deguei, la 9-an de Julio, 1925. La Centra Oficejo sin lokas en Kameoka (Japanujo). La Prezidanto Ŝ-ro O. Deguei

direktas la Asoĉion kaj S-ro Hidemaru helpas lin kiel Vicprezidanto. Kvankam ĝia historio estas nelonga, la movado disvolvigis kun mirinda rapideco. U.H.A. starigis lokajn centrojn en Parizo, Tokio, Mukdeno (Manĉukio), San Paŭlo (Brazilo) kaj filiojn en la tuta mondo, kiuj nombriĝas 1633 (en Nov. 1932).

U.H.A. celas la fratigon de la homaro sur la bazo de la Homaranismo. U.H.A. celas plue labori por la efektivigo de lumplena mondo, kie feliĉo kaj ĝojo floros por eterne. La homaro konsistas ja el gefratoj, kaj konkordo devas regi la tutan teron. En la moderna epoko, la vivcirkonstancoj tute aliformiĝis, kaj la homa koro ĉiutage malplibonigas. Se oni permesas, ke tiu ĉi danĝera procedo daŭradu, alvenos neevitebla katastrofo kaj la homaro multe pli suferos. Sur la bazo de Homaranismo, ni devas forigi la nunan kaoson. Pro tio U.H.A. vigle kaj sindoneme laboras por la disfaliĝo de la muroj inter nacioj, rasoj kaj religioj, kaj manpremanie kun samcelaj movadoj en Eŭropo kiel ankaŭ en Azio, ĝi klopodas kunfandi la tutan homaron en unu familian rondon kaj efektiviĝi la pacajn kunvivadojn kaj kunprosperon de la tuta frataro.

Tiel U.H.A. estas la movado de la plej alta idealo de la homaro. Sekve tiu ĉi devas esti vere grandioza entrepreno de Savonto. La celo de la movado estas tre bela kaj neniuj kuraĝas ĝin rekte kontraŭi. Kia ajn brila la celo estu — se al ĝi ne korespondas la personeco de ĝia gvidanto, utilus ja ne ion. La demando estas do nur la personeco de la gvidanto.

La Prezidanto, S-ro Onisabro Deguĉi.

Sinjoro Onisabro Deguĉi naskiĝis en la vilaĝo Anao, tre proksima al la U.H.A.-Centro Kameoka, en 1871. Jam en sia infaneco li montradis geniajn kapablojn. Kiam li estis 28-jara (1898), li faris unu semajnon da anima asketiko en proksima monto sub la gvido de dia sendito. Li eniris kaj detale esploris la spiritan mondon, ricevis diversajn instruojn pri la rimedoj de mondsavado, perceptis sian gravan mision plenumi la dian entreprenon: li ricevis aŭtoritaton esti spirita gvidanto de la homaro.

Depost tio, kun arda deziro plibonigi la

mondon, spite al ondoj da malhelpo kaj insulto, li daŭrigis senĉese ĉiam aktivan laboradon por la celo dum 30 jaroj. Mi ne povas tie ĉi detale skribi pri lia vivo.

En 1898, pro dia mistera aranĝo li renkontiĝis kun Oomoto-Fondinti o Nao Deguĉi kaj nuntempe li estas ne nur gvidanto de U.H.A. sed ankaŭ tiu de Oomoto, la nova spirita movado de mondreformo. Li vojaĝis al Mongolujo en 1924 por savi la tiean popolon, kiu estis preskaŭ pereonta, morale kaj fizike pro degenerinta religio kaj danĝeraj malsanoj. La semoj de amo semitaj de li en la lando bone kreskas kaj donas abundajn fruktojn. Dank' al lia spirita forto sennombraj suferantoj estis savitaj, ne nur spirite sed ankaŭ korpe. Multaj mirakloj ĉiutage okazis ĉirkaŭ li, tiel ke la vorto «miraklo» jam fariĝis tute ordi ara.

Esperanton li enkondukis en Oomoto jam en 1923 kaj fondis Esperanto-Propagandan Asocion en Kameoka, al kiu multe ŝuldas la nuna prospero de la Zamenhofa movado en Japanujo. Kiel la fundamenton de mondopaco, li fondis ankaŭ Ligon de Religioj en Peking, Ĉinujo, en 1925. Tiamaniere li ekskluzive sin okupas je edukado kaj gvidado de la homaro.

Nun la mondo rigardas lian aperon kun granda atento. Precipe Universala Rugvastika Asocio en Ĉinujo, kun kiu U.H.A. havas plej profundan rilaton, respektas lin kiel grandiozan gvidanton de la tuta homaro.

Al la Nova Vojo.

Se la homaro vere deziras la mondon de feliĉo kaj paco, ĝi nepre devas marŝi la vojon montritan de ĝia gvidanto. Tio estas vivado de Di-kredo kaj vojo de bon-amo.

La nuna mondo estas disfaliĝanta kun granda rapideco antaŭ la apero de nova socio. Sed tamen oni ne devas tro rapide konkludi ke tuj konstruiĝos ideala socio de paco kaj feliĉo post la disfaliĝo de la malnova socio. La pereado de la malnova mondo estas nura demando de tempo. Ni devas marŝi celante la vojon de rekonstruo preferinde anstataŭ disrompado. Ju pli disvastigos kaj fortiĝos la movado de rekonstruo, des pli firmiĝos paco kaj feliĉo de

l' homaro. Nun la standardo de la alta idealo de la homaro estas flirtanta kaj la Nova Vojo, sur kiu la homaro devas marŝi, estas klare montrita. Ni ĉiuj aŭskultu la instruon kaj agu laŭ ĝi. La rimedo estas simpla!

Ĉiuj simpatiantoj al U.H.A. povas aligi al la Asocio tute libere kaj senpage. Memvolaj donacoj de la membroj subtenas la Asocion. Ĉiuj lokaj organizaĵoj de U.H.A. estas liberaj starigi sian statuton, kiu tamen bezonas esti aprobita de la Centra Oficejo. U.H.A. adoptas Esperanton, kiel internacian helplingvon.

Por la realigo de sia celo, la Asocio eldonas diversajn organojn, propagandilojn,

laŭbezone sendas propagandistojn al diversaj partoj de la mondo kaj okazigas paroladojn, ekspoziciojn, kursojn. U.H.A. aranĝas sian ĝeneralan kunvenon en ĝia centra sidejo Kameoka, Japanujo, kvarfoje ĉiujare. U.H.A. eldonas du organojn komence de 1925: « Zinrui-Aizen-Sinbun », japanlingva dekada ĵurnalo grandformata, aperanta en Tokio, kiu havas 600.000 legantojn kaj « OOMOTO INTERNACIA », Esperanta gazeto internacia, aperanta en Kameoka (Japanujo).

Ĉiu interesiganto, kiu deziras detale sciigi pri U.H.A. petu diversajn propagandilojn.

Adreso: Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

El "Kusamakura"

Fragmento el Japana Literaturaĵo

De Soseki Nacume Trad. T. Nakamura

Suprenirante la monton mi pensis jene: Kruta fariĝas la vojo, se oni tro kroĉas sin ĉe intelekto; se oni lasos sin peli de emocio, oni trovos sin postlasata kaj se oni puŝos sian obstinan volon, la vojo fariĝos antaŭ si mallarĝigita. Vere estas malfacile vivi en *la homa mondo*. Kiam la vivmalfacileco tro grandigas, la homo ekdeziras translokiĝi ien for de zorgoj. Kaj ĝuste kiam li rekonis la saman malfacilecon kie ajn li iras, naskiĝas poemo aŭ fariĝas pentraĵo.

Nek Dio nek diablo kreis *la homan mondon*. Ĝin kreis neniu alia, ol la banala homo, kiu troviĝas ja en nia najbaraĵo. Ne estos ia mondo, kien la homo povos sin transmeti pro la kaŭzo, ke malfacile estas vivi en *la homa mondo* — kiun la homo mem kreis. Se troviĝus tia mondo, ĝi estus la sola — *ne-homa mondo*. Kaj tamen eble, pli malfacile estos vivi en *la ne-homa mondo*, ol en la homa.

Malfacile estas vivi en la mondo kaj el kiu la homo ne estas permesata foren transsalti, do li devas peni kiel eble plej komfortigi la malfacilan mondon, se eĉ momente en sia efemera vivo. Jen pro tio nas-

kigas la misio de poeto kaj estigas tiu de pentristo. Ĉiuj artistoj estas respektindaj pro tio, ke ili komfortigas la homan mondon kaj plenigas la homan koron.

Kio nuligas malfacilaĵon for de la malfacila mondo kaj reprezentas ĝin agrabla por ni, tio estas poemo, pentrarto, muziko kaj skulptado. Por diri pli detale, eĉ se oni ne reprezentos tian mondon per artaĵoj, jam eĉ la ekvido oni ja naskas en si poemon aŭ kanton. La sono de bela ritmo penetras en niaj animoj eĉ sen inko kaj papero por priskribi la impreson. La belaj koloroj vidigas en niaj okuloj eĉ sen kolorigo sur tolo. Se, sub la supre esprimita koncepto pri la mondo en kiu oni reale vivas, oni nur povos bele fotografi la malbelan mondon per sia fotografileto nomata koro — jam tio sufiĉas. Jen tial, kvankam al tiu ĉi senvoĉa poeto mankas versfarado, al tiu ĉi senpenika pentristo mankas papero, kaj tamen li estas la plej benata el ĉiuj feliĉuloj tiel nomataj en la reala mondo. Ĉar li povas koncepti la vivon tiel bele, li kapablas sin deteni de ĉiuj pasioj, sin komuniki al la spirita mondo kaj forviŝi ĉiujn egoismajn dezirojn...

FONOGRAFO

De H. T. K.

Misako pensis ke ŝi devus posedi fonografon. Ĉar unue, ŝi restas hejme sola sufiĉe longan tempon ĉiutage kaj die, la familio de Terai, loĝanta en multe pli malgranda loĝejo ĵus malsupre de la strato, havas ĝin. S-ino Terai diris, ke ĝi kostis ¥ 85, sed estas tute klare, ke ĝi kostis nur tutan sumon de ¥ 60.

La edzo de Misako opiniis, ke eble radio-aparato estus pli bona — lia frato laboras en granda kompanio de radio-aparato kaj po-granda prezo estos arangebla — sed Misako insistis fonografon. Estas nenio sur la radio krom multaj borsaj aferoj, lekcionoj kaj kiam oni havas muzikon, tio okazas je fiksitaj horoj, kiu eble ne taŭgas por personaj programoj. Krome, tiel multaj popoloj jam posedas radiojn.

Sia propaganda kampanjo estis tre simpla.

Unue, ŝi prezentis la deklaron montrantan kial fonografo estas dezirata, kvankam ĉi tio estas pure demando de formo. Viroj kredas ke ili posedas logikajn cerbojn, sed Misako sciis, ke en efektiveco, estas senutile provi ilin konvinki pri io ajn per rezoniga metodo. Sed samtempe estas plej bone montri iom da ŝajnigo ke ŝi povas fari tion.

Ŝi rapide trapasis al la petega parto. Ĉi tio povas esti efika kaj ne efika. Tio dependas de tio, en kia humoro ŝia edzo hazarde troviĝas. Multaj juĝoj estas necesaj. Se ŝi faras tion tro forte, li eble koleras kaj uzas vortojn signifantajn «plago» aŭ «ĝenaĵo». Se tio ne estas sufiĉe forta, li eble ne estas ĝuste impresita.

De tie ŝi iris al la postula parto, en kiu ŝia antaŭa argumento mallongigis al simpla «Fonografo, jo!» eligata je frekventaj kaj neatenditaj intertempoj.

Sed la edzo de Misako ne estis, eĉ proksimume, tiel severkora, kiel ŝi opiniis lin. Li havis nenian grandan kontraŭon por fonografo; male, li ofte aŭdis kantojn kiujn li tute ŝatus konservi hejme. Li nur iom hezitis elspezi monon por tio, kio estas en-

vere luksaĵo, sed ĉar lia edzino volis tian aferon, ĉu tio sufiĉe pravigas la elspezon?

Certe estas nenia utilo ke ŝi daŭrigu ĉiunminute en tago kaj nokto, fajfi «fonografo, jo!»

Ankaŭ li apartenis al la speco de homo, kiu kredas ke se li intencas aĉeti objekton, kio ajn ĝi estas, estas plej saĝe aĉeti bonan, do li skribis ¥ 100 — negocoj lastatempe iras iom pli bone kaj la sekvanta superpago eble povus kovri tion — kaj prezentis ĝin al Misako, dirante al ŝi en sia raŭka vireca maniero: «Iru aĉeti fonografon kaj finu».

Nature Misako ĝojis. Ŝi neniam songis ke li donos al ŝi tiom multe. Ŝi decidis iri la malsupran urbon la morgaŭan tagon por fari la aĉeton senprokraste.

Sed la «morgaŭo» alportis vizitanton kaj la sekvantan tagon estis por ŝi multaj aferoj farendaj hejme. Du tutaj tagoj pasis antaŭ ol Misako povis iri la malsupran urbon.

Kaj dume ŝi pripensadis. Cent Yen estas efektive granda sumo da mono, precipe en tiuj ĉi tempoj. Ŝajnas ne juste malspari tiel multe por fonografo. Viroj ne havas racion pri tiaspecaj aferoj. Post kelkaj jaroj la fonografo eluzigos, sed la ¥ 100 deponita ne sole estas sendifekta sed ankaŭ amasigos procentaĵon.

Anstataŭ iri al fonografo-vendisto, Misako vizitis la «Poŝtan Ŝparkason».

Kompreneble, la edzo de Misako tute ne koleras. Anstataŭe, li laŭdis ŝian ŝparemon kaj ridetis al ŝi, ke lia mono estas uzita por bona intenco: ĝi alportis iom da paco kaj kvieto kaj tamen ĝi troviĝas ankoraŭ en la familio. Estas sufiĉe facile trakti virinon, se oni scias la manieron.

Kelkaj semajnoj pasis kaj poste kelkaj monatoj. Aferoj daŭras multe kiel ili ordinare faras. Kaj tiam unu vesperon la edzo de Misako konsciis, ke lia kunulino fikse rigardas lin. Li flankenmetis lian ĵurnalon kaj atentis. Ŝia rigardo farigis eĉ pli fiksa.

«Fonografo,» ŝi diris. «JO!»

Tradukis K. H. Ŝiŝido, Kioto.

Japanana Legendo – RUGA VIZAĜO DE DIO

Eljapanigis T. Nakamura

La jena legendo rememorigas nin pri la japana proverbo, « Dio ne havas buŝon, sekve Li parolas per homa buŝo » kaj sugestas, ke en la mondo neniu « hazardo » ekzistas. Alivorte, nenio estas ekster dia arango. La nuna modo estas en ĥaoso la plej granda en la homa historio kaj tamen la tuta homaro ne scias kion fari; eble ĝi kredas ke la mondo iamaniere ekzistos por eterne kiel ĝis nun, ĉar ĝi jam ekzistis de miloj da jaroj. Nu, karaj legantoj, mi esperas ke la tuta homaro estos tiel piema kaj obeema al Dio kiel la maljunulo en la sekva legendo.

Proksime al Kjuŝu (la suda insulo de Japanujo) iam kuŝis bela insuleto nomata Korai. Sur tiu ĉi insuleto estis la templo de Ebisu (Dio de riĉaĵoj, kiu gardas la tutan loĝantaron de la insuleto).

Iun tagon geamatoj vizitis la templon kaj post preĝo ili dolĉe interparolis apud arbo ĉe la pordo, stelrigardante ĉirkaŭen kvazaŭ ili evitus homajn rigardojn. « Ĉiutage la ĉielo aspektas tiel malagrabla » ekparolis la junulo, « kaj fiŝkaptado jam delonge ĉesis. Kion do oni faru? Sen fiŝkaptado neniu povas vivteni sin sur tiu ĉi insuleto. Vel Malfeliĉa afero povus okazi, se ankoraŭ longe daŭrus tia stato. Jen, vi rigardu! Super la mondo Juhu estas terure ruĝe kaj la maro fajre reflektas la ardantan ĉielon. Ruĝa, ruĝa, ruĝega! ». « Ho! Terure! » kriis la fraŭlino, « se la vetero estus bona, estus je tiu ĉi horo de la tago kiam oni vidus malproksime vicojn da ŝipetoj, kiuj sin ŝovas heroe por kapti fiŝojn. Ni ne vidas ilin hod aŭ. Mi kredas, ke ĉiuj vilaĝanoj estas maltrankvilaj pro la malbona vetero. Ho! Denove ruĝiĝis la ĉielo, rokoj kaj la maro. Ĉio estas ruĝega kiel sango, kiel fajro. Ho! Terure! » La monto Juhu elspiregas ardantan fumon en la ĉielon. « Mia kara », daŭrigis la fraŭlino, tiun ĉi fojon en malpli alta voĉtono, « mia avo

diris al mi, ke se la malbona vetero ankoraŭ daŭrus kelkajn tagojn, li sin turnos kun preĝo al Ebisu-Dio, ke Li favoru nin per abundo da fiŝoj, kaj tamen se ankoraŭ oni ne povas kapti fiŝojn, li do oferos botelon da arako kaj kolorigos la vizagon de Ebisu-statuo per ruĝa farbo. Tiam Ebisu-Dio, laŭ la malnova tradicio, farigos ebria kaj pro bonhumoro alvokos fiŝojn. Sed ĉu tio povus esti vera, mi tre dubas! Pri tio estas alia tradicio. Oni diras, ke se iam venus la tago, kiam la vizago de Ebisu-Dio hazarde farigus ruĝa, tiu ĉi insuleto subite subakviĝus. Nekredebla, sed terura afero! Se mia avo deziras, do bone, li nur oferu preĝon, sed neniam li devas kolorigi la vizagon pro la vivo de la loĝantaro. Vivo estas kara. Mi ankaŭ ne ŝatas morti, kompreneble. » Kaj ŝi rigardis en la okulojn de la junulo, kiu baldaŭ ekparolis denove. « Pri tio mi ankaŭ eble aŭdis. Sed vi aŭskultu, se la vizago de Ebisu-Dio iam povus ruĝiĝi ja per si mem aŭ nature, tio devus esti grava afero kaj povus okazi akcidento. Tamen, ĉu ne, se mi mem ruĝigos la vizagon, tio neniom gravas? Interese! Mi alportu arakon kaj ruĝigu la vizagon esperante ke li alvokos fiŝojn. O, mi devas tuj tion fari. Ne povas okazi, ke la insuleto hazarde subakviĝos. »

Aŭskultinte tion ĉi, la fraŭlino iom pentis kaj pensis ke ŝi ne devis paroli pri tia afero, kaj tial ŝi penis persvadi lin forturni de tia danĝera intenco. Sed la junulo nur ridetis ironie kaj rediris, « Malsage. Nia insuleto jam de kelkmil jaroj ekzistas kaj sekve ĝi ankoraŭ ekzistos milojn kaj milojn da jaroj. Subakviĝo, ho! nekredebla afero! Malgraŭ ĉio mi devas fari tion tuj hodiaŭ vespere. » Leginte la decidon sur lia mieno, ŝi profunde pentis kaj denove petis, « Kara mia, tio estas tro danĝera afero. Bonvolu ne fari tion. Rigardu! Ondoj pli kaj pli altiĝas kun bruego. La vulkano erupcias nun kaj la ĉielo estas ruĝa. » ...

En tiu nokto tre malfrue oni vidis figuron en la mallumo eniri la sanktejon de Ebisu-Dio kun botelo da arako kaj farbo en la manoj. Estas senbezone diri ke la junulo li estis. Enirinte en la sanktejon li lumigis la kandelon kaj preĝis, « Ebisu-Dio! Mi petegas, ke vi bonvolu bone aranĝi por ke oni havu grandan fiŝkaptadon. » Li oferis arakon. Per tremantaj piedoj li alproksimiĝis timeme al la statuo kaj etendinte la manon li kolorigis la vizagon de Ebisu-Dio per unu movo. Apenaŭ li finis, li jam forkuris en la mallumon. La blanka vizago jam estis sangita en ruĝan kaj nun ĝi aspektis tute kolera.

Ne estis post longa tempo kiam maljunulo venis al la templo por preĝi. Sin turnante al la statuo li sidis kaj ekpregante li turnis sian rigardon al la vizago de Ebisu-Dio. Ĉe la ekvido li laŭte ekkriis, « Oh, te-te-te-teruraĵo! Ĉiuj forkuru el la insulo! Rugiĝis la vizago de Ebisu-Dio! Ondego venos! Uragano venos! La insu-

leto subakviĝos baldaŭ! » Li kriadis de vilago al vilago tra la tuta insulo kaj la tuta loĝantaro estis enmetita en grandan konfuzon. Kaj tamen neniu kredis ke la insulo subakviĝos tre baldaŭ. Neniu konsentis forkuri el la insulo. Nur la maljunulo preparis ŝipon kaj forkuris lasante malantaŭ si ĉiujn mokoĵojn kaj ridetojn. Apenaŭ la ŝipo malaperis foren, la monto Juhu kun terura bruego elspiris ardantan fajron. En la ĉielo kvazaŭ tondregis! Bataŝ kaj rebataŝ furiozaj ondegis. Ĉiuj krias en konfuzo enŝipiĝi! Ondego komencis engluti la insuleton pli kaj pli. Jen pluvego, jen tondrego! Baldaŭ nokta mallumo kovris la tutan universon — subaŭdigis en bruego la agoniantaj krioj de homaj estaĵoj, inter kiuj malfeliĉe ankaŭ troviĝis la gejunuloj, kiuj ĥieraŭ dolĉe interparolis. En la sekva mateno la ĉielo heliĝis kaj la suno brilis milde, sed oni ne povis vidi plu la verdajn konturojn de la insuleto Korai...



Futami-ga-Ura : fama ŝintoisma simbolo de geedzoj,
precipe bela ĉe sunleviĝo.

11. La Koscia Vivo

Antaŭ ol komenci la studon de tiu ĉi nova ĉapitro de psikologio, ni rekomendas al la leganto, ke li relegu la komencon de tiu ĉi artikol-serio, aperintan en la junia numero de la lasta jaro. Tiel li bone enordigos tiun ĉi ĉapitron en la grandan sistemon de la psikologia scienco kaj ne perdigos en labirintoj de detalo. En la lasta numero ni jam difinis la koncepton pri Koscia Vivo (aro de ĉiuj spertoj).

La mekanismo de la koscia vivo (koscio) estas la sekvanta: 1. Stimuloj estas ricevataj de la sensoroj, 2. impulsoj estas kondukataj en la cerbon, kie ili estas integrataj (enordigataj), 3. ordono estas sendata al la muskoloj por laŭcela respondo. Ni kredas, ke oni facile komprenos tiun ĉi skeman mekanismon de la koscia vivo. Ĝisnun ni jam ekzamenis la sensorojn, nun ni venas al la dua punkto, t. e. al la studo pri la integrado. Sen ĝi, la diversaj impresoj ricevataj estus sen interrilato kaj koscia vivo ne estus ebla. Ni do komencu la studon unue donante klaran bildon pri la koscio mem.

Koscio kaj Subkoscio. Estas tre malfacile klare difini la koscion — sed ĉiu bone «sentas», kio estas koscia kaj kio estas senkoscia. Kelkaj psikologoj entute neas la ekziston de koscio: nome en la skolo de «behaviorismo» (konduktismo). En la daŭro de niaj studoj ni klare elmontras la eraron de tiu skolo; nia firma konvinko estas, ke koscio ekzistas, ni do devas klopodi kiel eble plej bone difini ĝin. Eble la malfacilaĵoj ĉe la difino de koscio venas de tio, ke oni devas unue difini, kio estas subkoscio. Subkoscio estas verŝajne pligrava ol koscio. Plej ofte niaj kosciaj pensoj estas determinataj jam antaŭe de subkosciaj.

Cerbo, menso, koscio. Estas malnova diskuto pri la diferenco inter cerbo kaj menso. Cerbo estas materia, menso estas spirita. Laŭ la klasika teorio menso troviĝas en cerbo kaj ekzistas interago inter

ambaŭ. Laŭ pli moderna teorio, cerbo kaj menso estas la sama afero, laŭ du diversaj vidpunktoj. La interago inter cerbo kaj menso aŭ la «du diversaj vidpunktoj» de la nova skolo: tio estas ĝuste «koscio». Flankenlasante malnovajn diskutojn, kiujn ni ne pretendas solvi, ni ĉerpu plian klarecon el memobservado! Rigardu tiun libron, ekzemple. Vi havos unue *i m p r e s o n*, ĝi estas libro. Sed tuj poste, preskaŭ samtempe la trajtoj de via amiko aperas antaŭ via «menso» — ĉar la libro estas pruntedonita de tiu amiko. Tio estas *a s o c i a c i o* de ideoj, Memoro, tiu granda faktoro de mensa vivo ne estus ebla sen asociacioj. Memoro ne ĉiam funkcias egale facile. Krome kelkaj personoj havas bonan memoron, dum aliaj havas malfortan memoron. Iuj havas speciale bonan memoron pri nombroj, iuj pri muziko, ktp. Ekzercado en iu fako plibonigas la tiurilatan memoron. Kiam oni atentis, la mensa mekanismo funkcias pli bone; sed el atento venas mensa laciĝo. Kiam oni atente legas libron, oni ne aŭdas parolon de apudaj personoj, ĉe forta atento, eĉ kanonpafo povas resti ne aŭdita — sed se oni legas distrite, oni aŭdas eĉ malfortajn bruojn malproksimajn. Oni do vidas, ke koscio dependas ofte de atento, t. e. volo.

12. Pri Subkoscio.

Post tiu ĉi ekzerco en memobservado, ni eble vidas iomete pli klare, kio estas koscio. Por ankoraŭ pli akriĝi nian komprenon pri koscio, ni detale konsideros la subkoscion. Kiam oni rajdas sur biciklo, oni ne estas koscia pri la funkciado de la statika senso (en la interna orelo) — tamen tiu senso direktas la tutan ekvilibradon sur la biciklo tiom gravan. Komence ĉiuj muskoldmovoj korespondantaj estis kosciaj: tiam oni lernis bicikladon. Sed kiam oni estas lerta biciklanto, ĉiuj tiuj movoj estas subkosciaj. Same ĉe la parolo de iu lingvo. Komence oni pensas gramatike: tiam oni lernas; poste oni parolas subkoscie: tiam oni parolas flue. La fakto estas, ke koscio estas malrapida kaj rapide laciĝema

— estas pli bone utiligi la tre fortan subkonscion por gravaj aferoj. De tie venas la neceseco de lernado, kiel ankaŭ la graveco de aŭtomatigo de imagoj per ofta ripetado.

Povas okazi, ke dum longa tempo ni penas memori la nomon de iu persono, sed ni ne sukcesas. Fine, kiam ni jam pensas pri iu alia afero, la serĉita nomo subite aperas en nia konscio. Estas la subkonscio, kiu eltrovis la nomon en la vasta magazeno de forgesitaj imagoj! Same, la solvo de malfacilaj problemoj ofte estas farata de la subkonscio. Oni legas libron kaj ne aŭdis la baton de horlogo: kelkajn minutojn poste oni subite «memoras», ke oni aŭdis ĝin! Mirinda helpo de mistera subkonscio. Aliparte, subkonscio povas ankaŭ malhelpi nin, kiel ekzemple en la kazo de malagrablaj spertoj antaŭaj kaj hontindaĵoj jam forgesitaj sed subkonscie memorataj. Tia estas la origino de multaj malsanoj, kiel montrite en la psikanaliza scienco.

Psikanalizo. Sub la impulso donita de Sigmund Freud (Vieno) naskiĝis nova scienco, nomita «psikanalizo», kies nomo jam montras la celon: analizo al subkonsciaj pensoj. Ĉefprincipo de tiu ĉi scienco estas, ke oni povas ekkoni kaŝitajn pensojn de la subkonscio, laŭ certaj reguloj. Tiamaniere kuracistoj povas forigi certajn malsanojn, montrante ilian subkonscian originon. Por klare vidi, ni lumigu la ĵus diritajn aferojn per praktika ekzemplo.

Iu homo timegas kontakton kun viloj. Post lertaj demandoj de psikanalizo, oni montras al li, ke en lia infaneco li estis atakata de sovaĝa hundo, kovrita de viloj. Post la malkovro de la kaŭzo, la malsana timego malaperas. Freud kaj liaj disĉiploj pruvis, ke seksaj subkonsciaj imagoj ludas gravan rolon en nia konscia konduto. Multaj antaŭjuĝoj pri etika konduto estis renversataj de psikoanalizistoj. Ni ne apartenas al tiuj, kiuj skandaligas pro renverso de idoloj; sed elpure scienca vidpunkto ni devas fari kritikon eĉ al psikoanalizo:

1. Psikoanalizistoj troigas la rolon de l' subkonscio — ĉar ĝi estas la sola objekto de ilia studo. Finfine subkonscia personeco ne ekzistas, subkonsciaj tendencoj laboras plejparte sendepende. En ĉiu konscio loĝas diversaj subkonsciaj tendencoj: oni povas diri, ke ĉiu konscia personeco konsistas el kelkaj subkonsciaj personecoj, kiuj tamen ne kunlaboras, do la efiko de tiaj tendencoj estas multe malpli forta en la normala ho-

mo ol la efiko de la konscio. Alivorte, normale konscia volo estras la homon.

2. Ni suspektas la verecon de la tielnomata «songoteorio» de Freud. En tiu teorio objektoj aperantaj en songo havas simbolean signifon. Suno, ekzemple signifas patron, ktp. Ni ne kondamnas la eblecon de simbola interpretado de songoj — sed la diverseco en la simboloj ĝis nun ellaboritaj de psikanalizistoj mem asertas la malcertecon, kiu regas en tiu ĉi regiono.

3. Kvankam seksaj elementoj ludas pli gravan rolon en nia pensado ol oni antaŭe supozis, ni kredas, ke psikanalizistoj ordinare troigas ĝin. Certe, malpermesataj ideoj tendencas eniri la subkonscion kaj de tie influi la konscion — sed krom la seksaj ekzistas aliaj fortaj tiaj elementoj, kiel ekz. ĉiuj ideoj rilatantaj al mangado. Nutrado estas ja la prafenomeno de la vivo, ankoraŭ pli grava ol tiu de l' reprodukto. Livito al doloro kaj morto estas alia grava idearo.

Konklude ni povas diri, ke kvankam ni plene aprobas la metodon de psikanalizo, kiu estas ja korekta, ni malaprobas la troigojn pri songa simbolismo kaj seksaj, kaŝitaj ideoj.

Konkurso: Psikologiaj Demandoj

Por kontroli kiom da legantoj interesiĝas pri nia Psikologia Kolono, ni decidis aranĝi konkurson. Bonvolu sendi viajn respondojn senprokraste. Ĉiu ricevos premion laŭ la boneco de l' respondo. La Red.

- (1) Invalido kies dekstra piedo esti amputita, kelkfoje sentis doloron en la... mankanta piedo. Kiel klarigi tion?
- (2) Kial estas agrable suĉi ŝtoneton kiam oni estas soifa?
- (3) Kian avantaĝon vi akiras el la studo de Psikologio?
- (4) Kial aŭskulto al bona muziko estas ripoziga?
- (5) Nomu unu kutimon kiun vi volas akiri kaj klarigi kiel.
- (6) Kiaj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de rutino?
- (7) Ĉu geedza vivo estas kutimo aŭ instinkto?
- (8) Ĉu vi petus favoron al iu antaŭ tagmanĝo aŭ poste?
- (9) «Kiam mi vidis ŝin, mi instinkte ridetis.» Kial la ĵusa frazo ne estas korekta?
- (10) Kio estas la diferenco inter homo kaj bestoj?
- (11) Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de l' timoj.
- (12) Ĉu antaŭe pripensita krimo estas pli severe puniada ol tiu farita pro kolerego?

Epizodo de Pivivo

Dio ne estas fantazia, sed Li ekzistas efektive. Dio faras miraklojn. Tio estas evidenta inter Oomotanoj dank' al la Majstro Onisabro Deguĉi, kiuj spertis mem la favorojn de Dio dum sia pia vivado.

En moderna tempo oni antipatias la vortojn «Dio», «miraklo»... Ni ne troigas pri miraklaj aferoj. Ni konsideru la faktojn kiel naturajn okazaĵojn. Kiam la homoj gisfunde konvinkigos pri la esenco de spiro, tiu anti patio ĉesos.

Ĉar la okazaĵoj raportataj en tiu ĉi rubriko estas veraj spertoj, ili tuŝas la koron multe pli efike, ol malfacilega diskutado filozofia. Ni do esperas, ke niaj legantoj komprenos, kiel grava estas la rilato inter Dio kaj homo, kiel grandioza estas la spiro de Majstro O. Deguĉi, kiom da Oomotanoj mem spertas da graco.

En tiu ĉi rubriko ofte aperas la japana vorvo «miteŝiro». Do ni klarigos ĝin tie ĉi. «Miteŝiro» estas kuler-forma, ligna objekto, sur kiu Majstro O. Deguĉi skribis sian nomon kun polekso-signo: anstataŭaĵo de la mano de la Majstro, per kiu oni frostas malsanulon por resanigo.

Ĉi sube ni publikigas du komunikaĵojn senditajn al ni: unu de S-ino H. Ŭatanabe en Hokkaido, Japanujo. Alia estas de S-ino Sophie Cibera en Plzen, Ĉeĥoslovakio. La lasta estas nia propagandistino kaj ĉiam fervore laboras por nia movado. Laŭ la peto ni sendis al ŝi antaŭ ne longe «miteŝiro», per kiu ŝi ofte resanigas.

La vortoj de Sinjoro Hidemaru

Mi aliĝis al Oomoto nur en Julio 1932. Ĉar mi spertis grandan di-favoron, mi nun skribas al vi pri la okazintaĵo.

Depost akuŝo en Januaro lastjare, mi havis malbonan sanon kaj devis longe resti en la lito. Ĉar mi sola mastrumadis la hejmon antaŭe, la edzo des pli embarasiĝis. Kaj daŭris al mi tagoj tute sendormaj pro la maltrankvileco de tiuj aŭ aliaj aferoj. Al tiu hospitalo, al ĉi tiu kuracisto — mi

perdis prudenton laŭ tro multaj konsiloj de ĉirkaŭuloj ne povante plene fidi al Dia savo. Malgraŭ ĉiuj rimedoj, la malsano pli progresis kun la tagoj tiel ke fine mi tute perdis la liberecon de la korpo, precipe ĉe la talio.

En tia stato, la 18an de Septembro en la lasta jaro, mi bone memoras, Sinjoro Hidemaru (la adoptita unua filo de la Majstro) vizitis la Oomoto-filion en mia urbo Asahigaŭa, okaze de lia vojaĝo en Hokkaido. Informite pri tio, mi tre deziris renkonti lin ĉar mi ofte aŭdis pri lia eksterordinara personeco. Mi jam ne povis toleri resti hejme, kaj laŭ mia fervora peto la edzo kondukis min al la filio per veturilo. Survoje mi estis tre ĝoja.

Kiam mi vidis S-ron Hidemaru en la filio, mi sentis min simila al orfo, kiu renkontis sian karan patron post longa vagado. Laŭ la bonkoreco de aliaj ĉeestantoj mi sidigis proksime al la altaro kaj S-ro Hidemaru. Lia rigardo estis ofte direktata al mi. Baldaŭ komencigis di-servo, dum kiu mi daŭrigis la preĝon en neordinara agrableco.

Post la di-servo, forirante S-ro Hidemaru ial metis la manojn sur miaj ŝultroj kaj diris nur simple:

«Ne maltrankviligu! Vi baldaŭ resanigos.»

Samtempe kun la diro, subite li sentis doloron ĉe la talio kaj apenaŭ eniris en aŭtomobilon helpate de kelkaj aliaj. Tiu ĉi doloro daŭris ĉirkaŭ kvin minutojn, post tio li farigis ree sama — tion mi aŭdis poste.

Post tiu ĉi okazintaĵo subite mi farigis tute komforta kaj dum ĉirkaŭ tri tagoj mi daŭre dormadis tage kaj nokte. Eble estis post tri tagoj — mi provis starigi per mi mem, kaj mi sukcesis tute facile. Nun mi ne povas plene esprimi mian danksenton. Varmaj larmoj trafluis miajn vangojn. Mi sidigis sur la lito kaj nur dankis grandan favoron de Dio kaj rememoris la noblan figuron de S-ro Hidemaru.

Nun mi decidis servi al nia Oomoto-movado per mia tuta forto.

Diferenco

Friedrich Hahn, Bremen.

*En revo estas mi riĉulo,
En rev' mi estas reĝ'!
Je pompa, ora tron' ŝanĝiĝas,
En revo, mia sēg'.
Kaj mia estas ja trezor'
De or'! — o ho!*

*Sed ve! En la reala mondo
Mi estas simpla hom'.
Mi estas same grava kiel
En univers' — atom'.
Malriĉa estas mi poet',
Prolet'! — ho ve!*

Kreado

Kanjo Haselbauer, Braūnaū.

*Mi iras en 'garden' de Dio
Jen estas bela harmonio
Mi aŭdas de l' Kreinto vorton
Belecon kreas 'gi kaj forton.

Al ĉia kreitaĵ' Li donas
Purecon, amon kaj Li kronas
La tuton per la sankta spiro
Ke vivu 'gi en Di-admiro.

Sed la estaĵoj fieriĝis
Forgesis danki sian Dion
Li koleĝis kaj punante
Detruis Li la harmonion.*

El letero de nia Ĉeĥa propagandisto

... «Mi sanigis du personojn, kiuj suferis pro subita dentodoloro. Iu sinjoro en Villach okaze de mia somera restadejo subite plendis pri doloro de dento. Mi diris, ke mi havas rimedon kaj rakontis al li pri Oomoto-movado kaj samtempe pri «mitesiro». Li diris: «mi ne kredas je tiaj mirakloj.» Mi do klarigis: «ankaŭ sen kredo vi povas resanigi». Tiam li konsentis. Mi aplikis kaj post mallonga tempo li diris: «Doloro ĉesis — mi estas surprizita — neniam mi estus kredinta, sed tio estas fakto, mi ne komprenas tion». Kaj li promesis lerni Esperanton kaj poste interesigi pri Oomoto. Li donis al mi sian adreson.

La kelnerino de tiu hotelo, kie mi sanigis tiun ĉi sinjoron, venis kaj petis min, ke ankaŭ ŝi jam tri tagojn suferas pro

dentodoloro. Ankaŭ ŝin mi tuj resanigis, pri kio ŝi tre miregis. Poste mi sanigis sinjorinon el Vieno suferintan pro kapdoloro. Ĉe la aplikado de «mitesiro», la doloro tuj foriris. Ŝi tre dankis kaj komprenis la aferon, ĉar ŝi okupas sin pri spiritualismo kaj ofte legis pri tiaj fenomenoj.

Ĉi tie en Plzen mi aplikis «mitesiro» al samideano, kiu suferis pro apopleksio — sekvo de milita servo, kie li multe suferis kaj nervomalsanigis... Mian karan patrinon mi post longa aplikado ankaŭ savis de artrito kaj reŭmatismo. Pri tio mi speciale dankas vin tutkore. Sinjoron en Vieno mi kuracis de sendormemo, stomak- kaj intestodoloroj, post kelkfoja — eble 5 foja aplikado. Tiu ĉi sinjoro promesis lerni Esperanton kaj abonigi la gazeton «Oomoto Internacia». Mi havas lian adreson...

L. S. Shanchuan

PER ESPERANTO TRA JAPANUJO

(daŭrigo el «Oomoto»)

VOJAĜRAPORTO (10)

Jozefo Major

Tra la kolonioj: En Formoso.

Fino de Novembro estas vintra sezono en Japanujo kaj vintro signifas froston por la fremdulo, kiu ne ankoraŭ alkutimiĝis al la severa japana klimato kaj al loĝado en lignaj domoj, en kiuj mankas hejtado, laŭ la okcidenta senco. Des pli mi estis kontenta fuĝi el tiu ĉi vintra mondo al la eterna somero de l' Sudo, al la japana kolonia insulo: Formoso. Fidele al la nomo — kiu en portugala lingvo signifas «bela» — la insulo meritas sian reputacion.

Bedaŭrinde, en mia oficiala raporto aperanta tie ĉi, ne estas eble priskribi la grandiozajn vidaĵojn kaj la interesajn travivaĵojn, kiujn mi spertis dum mia du monata restado en la tropika regiono. Tiujn mi rezervos por mia poste aperonta libro pri Japanujo.

La 24an de Novembro mi ekveturis de nia **Kameoka Centro** akompanate de S-ro Soogecu Inoue kiu konfirmis sian reputacion de kapabla tradukisto kaj estis same bona kunvojaĝanto kiel dum nia antaŭa vojaĝo tra Hokkaido. Jam post kelkaj horoj ni alvenis en **Kobe**, kie ni estis afable akceptataj de lokaj samideanoj. Vespere okazis intima kunveno, en vera «verda atmosfero». La 26an de Nov. ni enŝipiĝis sur la «Asahi-Maru», kiu transportis nin dum tri tagoj al Formoso. La 27an de Nov. ni tuŝis la havenon de Moji, kie ni promenis dum kelkaj horoj, akompanate de kelkaj samideanoj, el kiuj unu estis nia propagandisto speciale elsendita por instrui Esperanton. La 29an de Nov. ni alvenis en **Kiirun**, ĉefa haveno de Formoso, kie atendis nin grupo de Geomotanoj kun flagoj kaj entuziasmo. Mia unua impreso ne trompis min, ĉar veturante tra la tuta insulo mi spertis poste, ke la fervoro de Oomotanoj estas ju pli granda, des pli oni malproksimiĝas de la Centro. Post mallonga ripozo en la loka Oomoto-Filio ni veturis al la ĉefurbo **Taihoku**, kiu estas tute proksima al la haveno, en la norda pinto de la insulo.

Tie ni loĝis dum longa tempo — periode interrompita — en la domo de S-ro Kinoshita, ĉefo de la lokaj Oomotanoj kaj lia varma gastigado kiel ankaŭ diligenta organiza laborado meritas apartan dankon en tiu ĉi loko. Alia sinjoro, kiu estas speciale dankinda estas profesoro Saburo Kai, en la loka kolegio, gvidanto de la Esperanto-movado en Formoso,

kio faris al ni grandegajn servojn. Aliaj helpintoj — ilia nombro estas tre granda — bonvolu pardoni, se pro manko de spaco mi ne povas mencii ilin aparte: ili konsideru, ke ili faris servon ne nur al ni persone sed ĉefe al la Movado! Post nia alveno sekvis kelkaj liberaj tagoj, kiujn ni utiligis por ĉirkaŭrigardado — estas tre multaj vidindaĵoj! — kaj preparado de nia laboro, kiu, kiel oni vidos baldaŭ, estis sufiĉe «ŝvitiga».

La unuan paroladeton mi faris en la monata Oomoto festo en Taihoku, la 3an de decembro, kie la lokaj gekredantoj bonvenigis min. La 4an de dec. okazis la 2a **Esperanto Kongreso de Formoso**, kie ni kompreneble partoprenis kaj paroladis. Ĉ. 100 personoj kunvenis, el kiuj eble 10 parolis nian lingvon, la aliaj estis komencantoj.

La tuta Kongreso konsistis el unu sola kunveno dum antaŭtagmezo. Krome estis ankaŭ **Ekspozicio** de Esperantadoj, en granda ĉambrego, en la centro de l' urbo, ĝi altiris multajn vizitantojn. Ni aranĝis specialan standon en la Ekspozicio.

La 5an de dec. mi paroladis en la Kolegio pri Hungarujo kaj Novzelando antaŭ ĉ. 400 lernantoj kaj kelkaj profesoroj. Tiu ĉi estis nia unua parolado en lernejo; oni vidos, ke multaj aliaj sekvis. Ĉie ni altiris la ĝeneralan atenton al Esperanto; ni ne propagandis ĝin rekte, sed ni uzis ĝin por praktika celo, tiel ke neniu plu dubis pri ĝia valoro kaj utilo. Dum la sekvaj tagoj mi vizitadis la urbon akompanate de pluraj «formosanoj» samideanoj. Formoso estas loĝata de pli ol 4 milionoj da «formosanoj» el ĉina raso, kelk-centmil Japanoj kaj kelkaj miloj da indiĝenoj.

Ni vizitis ĉinajn restoraciojn, te-pakejon, riz-pistejon kaj aliajn neordinarajn lokojn kaj ĉie mi ricevis eĉ teknikajn klarigojn en Esperanto. Tia intensa uzo pri nia lingvo en malproksima Formoso estas nepre notiinda. Kaj kia bona metodo de malrekta propagando ĉe firmoj, lernejoj, ktp! En tiu ĉi fora lando malofte vizitata, fremdulo estas treege atendata. Mia modesta persono neniam estis antaŭe tiel grava kiel tie ĉi, ne pro ĝia persona valoro sed nur dank' al specialaj cirkonstancoj. La fieruloj de l' mondo meditu pri tio, ke la Relativeco validas ne nur en fiziko...

La 8an de dec. okazis parolado en la Medicina Altlernejo pri la historiaj rilatoj inter orienta kaj okcidenta medicinaj studentoj. Ĉeestis ĉ. 100 medicinaj studentoj kaj kelkaj profesoroj. Oni mezuru la diferencon inter la efiko de tia faka parolado, parolado pri frivolaĵoj (vojaĝrakonto, filmoj, k. a.) kaj ordinara propagandparolado! La sekvan tagon mi paroladis ĉe knabina liceo antaŭ 500 lernantinoj pri... la Orienta kaj la Okcidenta Virinoj. Ĉium medion oni plej bone konkeras per temo, kiu speciale interesas ĝin. Komercisto devas liveri la artiklojn, kiujn la aĉetantaro deziras: propagandisto devas paroladi pri temoj, kiuj interesas la aŭdantaron. Se ni nur parolas pri Esperanto, ni ne sukcesos akceptigi nian lingvon.

La 10an de dec. okazis parolado en knaba gimnazio pri Novzelando antaŭ ĉ. 500 lernantoj. Mi ne bezonas aldoni ĉe la mencio de l' sekvaj paroladoj, ke la direktoro kaj kelkaj profesoroj ĉeestis persone.

La 11an de dec. ni vojaĝis al **Soozan** per aŭtobuso, vilaĝo kuŝanta en alta valo, inter proksimaj montoj. Tie troviĝas la centra Oomoto-Domo («be-cuin») de Formoso. La morgaŭan tagon ni reiris al Taihoku kaj tuj daŭrigis la vojaĝon per vagonaro ĝis **Taiĉu**, urbo kiu kuŝas en la mezo de la insulo, 100 mejlojn sude de Taihoku. La klimato, kiu estis milda en Taihoku (vintro) estas nun varmega en la sudo (somero): tia estas la geografia paradokso okazigita de la tropika linio kiu dividas la insulon en du partoj havantaj mal-amajn sezonojn, kvankam la tuta insulo estas nur 250 mejlojn longa! Rigardante tra la fenestro de l' vagono, oni vidas, ke la kreskaĵoj pli kaj pli fariĝas tropikaj: bananujoj, ananasujoj, kamforarboj aperas kaj ĉie la okulo paŝtas sur blankaj floroj de suker-kanon, gracie ondigaŭta en venteto... En Taiĉu mem, en la domo de l' afabla advokato Takahaŝi, kie ni trovis pli agrablan loĝejon ol en nia hejmo, ni kolektis tropikajn fruktojn de l' arboj kaj manĝis ilin en la ombro de la samaj arboj. Dum tiu ĉi tempo, tri tagojn da ŝipveturo norden, niaj kolegoj frostotremas inter neĝkovritaj montoj de Kameoka... Tamen, oni ne kredas, ke mi estis senenergiaj en tiu ĉi rava-reva pejzaĝo. Laboro atendis nin en Taiĉu! La vesperon de nia alveno okazis kunveno de la loka Esp. Grupo kun la 14 samideanoj, kiuj partoprenis kurson de nia antaŭe elsendita speciala propagandisto, S-ro Hirose. Jen kiel laboras nia Esp. Propaganda Asocio, eĉ en Formoso!

La 14a de dec. estis tre (ŝvitiga) tago, ĉar ni havis kvar paroladojn sinsekve en knaba liceo pri Japanaj Impresoj (400 lernantoj), en knabina liceo



Parto de la Oomoto-Fako en la Esperanta Ekspozicio, Taihoku.

pri virinaj demandoj, en la Pedagogia Asocio pri la rolo de psikologio en edukado antaŭ la geinstruistoj de l' urbo kaj fine, vespere, en la urba hospitalo antaŭ ĉ. 50 flegistinoj kaj kelkaj kuracistoj pri ĝenerala temo. La sekvan tagon mi paroladis en la komerca lernejo pri Novzelando kaj ĝiaj komercaj rilatoj kun Japanujo (400 lernantoj). Vespere mi ĉeestis festkunvenon de la lokaj Geomotanoj, kie regis frata atmosfero de spirita frateco!

La 18an de dec. ni daŭrigis la vojaĝon suden kaj alvenis al **Kagi**. Tuj poste ni reveturis malantaŭen per vagonaro kaj aŭto al **Seira** kie okazis inaŭguro de nova filio de U.H.A. Tie ni renkontis S-ron Doi, speciale senditan Oomoto-propagandiston por Formoso. Dum la ĝenerala kunveno mi ankaŭ prenis la parolon. Poste okazis Komuna tagmanĝo kaj procesia marŝado tra la vilaĝo; fine ceremonia festeno por la ĉefaj laborantoj. Vespere ni reiris al Kagi tute lacigitaj de longa vojaĝo. La 19an de dec. okazis granda publika parolado en bela salonego, kie mi paroladis pri Japanujo el filozofia vidpunkto. 500 personoj ĉeestis, inter ili pluraj ĵurnalistoj, kiuj stenografis la tuton. Ne bezone rimarkigi, ke la gazetaro de Formoso detale raportis pri nia parolad-vojaĝo kaj unu ĵurnalo de la ĉefurbo publikigis longan propagandartikolon, de mi verkitan. Ĉe la fino de tiu ĉi publika parolado la elektra kurento rompiĝis kaj la salonego dromis en mallumo. Tamen, okazis nenia paniko, ĉiu restis sur sia sidloko, atendaute ke oni alportos kandelojn. Kia disciplino de la amaso, kia bona konduto, kia ekzemplo por Eŭropanoj!!!

La 20an de dec. mi malsukcesis supreniri la montegon «Arisan» pro uragano sed anstataŭ tio detale vizitis gigantan uzinon de ligno-segado kaj mirindan botanikan ĝardenon, en kiu oni kunigas ĉiujn tropikajn arbojn, (daŭrigota)

Kelkaj notoj pri la Aŭstraliaj Indiĝenoj

La sekvantaj notojn mi faris el lekcio farita de antropologo A. P. Elkin, M. A., Ph. D., antaŭ Asocio por la Protektado de Indiĝenaj Rasoj en Sydney, 23an Junio 1931. Tre malrapide politikistoj sekvas la konsilon de scienco pri la konduto al indiĝenaj rasoj. Kontraŭe al antaŭjuĝoj, la Aŭstraliaj Indiĝenoj efektive posedis alte evoluantan kulturon de stonepoka tipo. Ankaŭ ili estas adapteblaj se nur traktitaj taŭge kaj science. Se Registaroj ne haltigas sian senkoran sintenon al indiĝenaj rasoj, sintenon tro ofte bazitan nur sur nescio, ĉi tiuj rasoj baldaŭ formortos. Materialisto eble diras ke tio ne gravos, sed eĉ el tute materia vidpunkto, la formortigo al la Aŭstraliaj indiĝenoj malprogresigos la evoluon de la terparto kiun ili nun okupas. La morala kulpo pri tia mortigado, tamen, estos multe pli grava.

L. Thomson, Sydney.

SOCIA ORGANIZADO

Prof. A. P. Elkin

Gentoj. La Aŭstraliaj Indiĝenoj dividiĝas en pluraj gentoj (eble ĉirkaŭ 500 aŭ pli en jaro 1788) ĉiu distingebla pere de la posedo de bone difinita teritorio, genta nomo kaj aparta dialekto. Plue, grupoj de gentoj, kelkfoje eĉ solaj gentoj, estas distingitaj de diferencoj en sociaj leĝo, k' timo kaj mitaj kredoj, kvazaŭ apartaj nacioj estus naskiĝontaj.

Hordoj. Denove, ĉiu gento dividiĝas je nombro de lokaj grupoj aŭ hordoj. Hordo konsistas el grupo de personoj ĉiuj parenigitaj laŭ la patra linio. Ili posedas la ekskluzivajn ĉasadan kaj tendaran rajtojn de bone limigita subdivido de la genta teritorio, kaj devas observi fiksitajn regulojn kiam ili volas viziti aliajn hordojn. Iafoje la anoj de hordo apartenas al unu totema aro, sed tre ofte al pli ol unu. Ĉi tiu lasta okazas kiam la deveno de la totemo estas patrinlinia: la deveno de la hordo estas patralinia. La komunaj aferoj de la hordo estas kontrolitaj de unu el la malju-

naj viroj, — la ĉefo, kaj la tuta konsilantaro de la gento konsistas el la ĉefoj el ĉiu hordo.

La horda regiono estas la hejmo de ĝiaj anoj. Ĉi tio estas por ili ne nur materia asocio. Ĝi estas ne nur afero de tiuj sentimentoj kaj alkroĉigoj kiuj estigas inter persono kaj la regiono en kiu li kaj liaj prapatroj kunigis dum generacioj. Ĝi estas afero pli profunda. Ĉiu notinda natura aĵo de la regiono estas la temo de iu popolarakonto aŭ mito kiu ligas la anojn de la hordo al la tempoj de la prapatroj kaj al la grandaj gentaj kultur-herooj. Sed eĉ ĉi tio ne tute klarigas la signifon de la hord-regiono kiel hejmo. Por kompreni ĉi tion, ni devas rememori la indiĝenan kredon pri la praekzistado de spiritoj. Laŭ la ĝenerala formo de ĉi tiu kredo, estas kutime en ĉiu hordo-regiono almenaŭ unu spirit-infano-centro: ĉi tio povas esti puto, kavo, fonto aŭ granda roko. La spirit-infanoj estis transportitaj al, aŭ ekzistigitaj ĉe, la aparta spirit-centro de la grandaj prauloj kaj herooj de la longe pasinta epoko kiam la nuntempaj institucioj fondiĝis. Kaj tie la spiritoj jam atendis sian enkarnigon, tio estas, ili jam atendis ke patro 'trovu' ilin kaj patrino 'nasku' ilin; kaj tien ree ili laŭ kredo de multaj gentoj revenos post la morto.

Tiel, la hord-regiono kun ĝia spirit-centro estas hejmo en spiritala sencio. Ĝi jam estis la hejmo de la individuaj spiritoj dum epokoj antaŭaj al la enkarnigo, kaj ĝi estos ilia hejmo post la morto. Tial sen vorta elmonstro, ĝi estas 'hejmo' dum la periodo de enkarnigo, t. e. dum la vivo mem. Tio estas la ĉefa kaŭzo kial indiĝeno kiu eble dungigas kiel laboristo al persono ekster la hord-regiono, volas reveni tien de tempo al tempo, kaj fariĝas malkvieta, maltrankvila se li ne ricevas permeson, por ke li vizitu ĝin: ja, li tre kredeble foriros sen permeso, kaj eble revenos poste por rehavigi sian lokon kvazaŭ nenio estus okazinta. Nu, la saĝa dunganto allasos ĉi tiun nostalgion, kaj proponos libertempon kiam li vidas la signojn de maltrankvilo, samtempe demandante ke

la dungito dumtempe provizu anstataŭiganton. Ĉi tiu plano ja bone funkcias; ambaŭ partioj kontentigas. La provizo de anstataŭiganto de la indigena laboristo instruas al la indigenoj ke la laboro de la dunganto ne povas esti senzorge neglektita, kaj samtempe, estas la plej facila kaj kontentiga maniero laŭ kiu ricevi anstataŭigan dungiton, ĉar, pro la parenca leĝo, ĉiu persono estas tiel parencigita al nombro da aliaj ke ili havas nepran devon helpi unu la alian kaj interŝanĝi 'donacojn'.

La spirit-hejma flanko de la indigena teritorio ankaŭ klarigas la nevolemon kaj oftan rifuzon flanke de maljunuloj lasi ĝin por eklogi ĉe iu misiejo aŭ nutradejo kie ili multe pli bone fartus ol je la preskaŭ mortiga malriĉeco de sia propra tero. Ili nur respondas rilate al sidloko de misiejo aŭ nutradejo, «Tio ne mia lando», aldonante, «Ĉi tie mia lando». Afero Finita! Pli bone estas lasi ke ili mortu en sia propra regiono ol mortigi ilin de 'nostalgio' en fremda lando kvankam ĝi abundas je teo, faruno kaj medikamentoj. Tre ofte, tamen, bov-kaj ŝaf-stacioj (bieno) lokigas tiel proksime al la hejmo de la maljunuloj ke ĉi tiuj povas ricevi manĝaĵojn de la hordaj parencoj kiuj laboras ĉe bienoj. Tamen, kiel ajn estas, ni povas vidi ke la «sopirado al la hejmo» estas spirita fakto kiu donas praktikajn problemojn por ambaŭ la indigenoj kaj la dungantoj.

Elangligis L. Thomson

Spite al la majstra scienca laboro de Prof. Elkin kaj aliaj antropologoj, ni nun (Septembro 1932) trovas ke la Registaro de Aŭstralio ricevas proponojn celantajn devigi ĉiujn indigenojn esti en kelkaj negrandaj teritorioj, tute fortaj de la spirit-hejmoj de la apartaj hordoj. La efektivigo de tiaj proponoj estus efektiviĝi la formortadon de la restaĵo de la Aŭstraliaj indigenoj. Tamen ni plue trovas ke unu el la Registraraj Ministroj deklaras — «Estas ofte tre malfacile rezisti la proponojn de bonintencaj sed nesciaj personoj». Sendube, la Ministro povus aldone — «kaj proponojn kiuj pli-

faciligos la gajnojn de grandbienestroj», ĉar la bienestroj imagas ke forrabi la indigenojn de siaj 'sanktaj lokoj', siaj spirit-hejmoj, ebligos al ili pli facile uzi la teron. Sed tiel ili formortigos la indigenojn, kiuj vivante multe povas helpi al la bienestroj en la laborado de bov-kaj ŝaf-bieno. Eble protestoj el alilando helpos en la savado de malfeliĉaj indigenoj kies spirit-vivo estas minacata.

L. Thomson, Sydney.



Singapore:
sur la revenvojo de
S-ro Koogecu Niimura.

La homaj deziroj similas salakvon; ju pli oni trinkas, des pli oni soifas.

Konfio

Kun plezuro ĉiam mi akceptas ideon, kiu celas pligrandigi la nombron de feliciaj kaj kontentaj homoj.

Franklin

Respondo el Japanujo

Ĉiuj abonantoj de OOMOTO INTERNA-CIA rajtas fari du demandojn, koncerne al Japanujo. La demandantoj legos la respondojn en tiu ĉi rubriko, kiun ni plezure disponas al niaj abonantoj. La demandoj devas esti klaraj, koncizaj kaj mallongaj.

Demandoj: 1. Kion faras japanaj geknaboj en Novjaro? 2. Kiaj estas la karakterizaj mangaĵoj de japanoj? *S-ro John Davidson, California, Usono.*

Respondo: 1. Kiam Novjaro venas, japanaj geknaboj estas gajaj. La 1-an de Januaro ili ellitiĝas, pro la ĝojo, pli frue ol ordinare, kaj deziras Feliĉan Novjaron. Poste kune kun ĉiuj familianoj ili mangas «Ozooni», kiu konsistas el tradiciaj riz-kukoj kaj legomoj en faba supo.

En la mateno de la 1-a tago ili ĉeestas al la Novjara ceremonio en sia lernejo: kantas la nacian himnon kaj kanton de jarkomenco antaŭ la portreto de la Mikado... Reveninte hejmen, knaboj sin amuzas per kajtoj kaj stilzoj (el bambuo) kaj knabinoj per pilkludo kaj «Hane-cuki». «Hane» estas nigra, peza pilketo kun plumoj kunligitaj, kaj kiam ili batas ĝin per batilo, ĝi malpeze ŝvebas en la aero. La batilo estas el tabulo ĉirkaŭ duonmetron longa kun tenilo, ofte ĝi havas pentritajn aŭ broditajn ornamaĵojn sur la dorsa flanko. (Angle: shuttlecock and battledore) Tre elegante vestitaj knabinoj en japana kimono kun longaj manikoj kaj granda zono ludas «Hane-cuki» sur la strato gaje kantante tradician kalkulkanton. Tio estas speciala aspekto en Novjara tago de Japanujo.

Kiam la 4a tago venas, komenciĝas la rutino, tamen geknaboj ankoraŭ daŭre ludadas per kajtoj kaj «Hane».

2. Japanoj senescepte ĉiutage mangas rizon, ĉar ĝi estas la ĉefa mangaĵo. Kiel akcesoran mangaĵon, ili plej multe mangas legomojn, diversmaniere kuiritajn. Fiŝojn ili ankaŭ ŝatas. Karakterizaj japanaj mangaĵoj estas «misoŝiru» kaj «cukemono». La unua estas supo el fabo, kiun oni ĉefe prenas por matenmangaĵo kaj la lasta estas peklita legomo, prenata ĉe la fino de la mangaĵoj. Kvankam preskaŭ ĉiuj mangaĵoj japanaj estas malpezaj (malriĉaj je graso),

oni ne kutimas havi deserton. Kvankam tre simpla mangaĵo, Japanoj neniam forgesas la propran guston de «rizo kun verda teo».

Post la importo de Eŭropa civilizacio, Japanoj kutimigis ankaŭ al viando, sed ĝi ne estas ĉefa mangaĵo kompreneble kaj legomoj estas ĉiam preferataj.

Demando: Kio estas la japana dramo «Noo»? *S-ro Stanis'av Iichel, Ruppertsdorf, Ĉeĥoslovakujo.*

Respondo: «Noo» estas malnova kaj klasika dramo, unu el la diversaj publikaj amuzaĵoj en Japanujo. Ĝi estas prezentado simila al opero kaj konsistas el muziko kaj danco akompanata de recitado de japana kanto «Utai».

La «Noo» dramo evoluis el antikva religia danco kaj populariĝis de post la 16-a jarcento. En la komenco tiu ĉi prezentado estis preskaŭ propraĵo de la aristokrataro kaj eĉ nuntempe ĝia ĝuantaro plej multe troviĝas inter altklasuloj.

La prezentado ĝenerale komenciĝas per muziko, kiu konsistas el flutoj, grandaj kaj malgrandaj man-tamburoj, kaj bastonet-tamburoj. La ĉefaj prezentantoj portas maskojn. Ili vice aperas sur la scenejo: iuj rondiras dancante, aliaj estas preskaŭ senmovaj, intertempe okazas dialogo, prezentanto kantas sole, aŭ akompanas lin la ĥoro de «Utai», kiu konsistas el ĝenerale 10 personoj. Dancantoj, «Utai»-kantantoj, muzik-ludantoj — ĉiuj ludas laŭ sia propra rolo kaj tie prezentigas klasika «Noo» en bona harmonio. La dramo estas bazita sur mitologio, antikva historio aŭ religia legendo, kaj tre ofte rigardantoj estas tuŝitaj pro la arta kaj nobla enhavo profunde spirita.

La dancmaniero estas tre malrapida kaj solena. Unu akto daŭras ĉirkaŭ unu horon kaj la tuta prezentado enhavas kvin aŭ ses aktojn. La scenejo estas sufiĉe vasta kaj speciale konstruita. La orkestro sidas en la fono kaj la ĥoro de «Utai» ĉe la dekstra flanko — ambaŭ senmove.

Ĉiuokaze la «Noo» estas tute specialaĵo de japana kulturo. Por klarigi tiun ĉi puran japanan necesas sufiĉe da paĝoj kaj fotoj. Do alian fojon mi skribos pli detale.

M. R. Samrak

Japanana lingvo por Esperantistoj

7 (daŭrigo el «Oomoto»)

Pri Ideogramoj (Daŭrigo)

Kombinoj: Kiam du ideogramoj sin sekvas sen «Kana» inter si, ofte, sed ne ĉiam temas pri «Kombinoj». Bedaŭrinde, la kombinoj prezentas grandan malfacilaĵon ĉar lego kaj signifo estas ofte malregulaj. Por bone kompreni, kio estas kombino, ni unue konsideru la regulajn kombinojn, ĉe kiuj ambaŭ lego kaj signifo estas regulaj:

Tie ĉi estas du eblecoj: ambaŭ elementoj estas legataj laŭ «Kun» aŭ ambaŭ elementoj estas legataj laŭ «On» (Pri la signifo de «On» kaj «Kun» vidu la antaŭan lecionon.)

Ekzemple en 出口 deguĉi (elirejo) ambaŭ 出 de kaj 口 kuĉi estas «Kun» sed en 三人 SAN'NIN ambaŭ 三 SAN kaj 人 NIN estas «On» elparoloj.

Por perfekte komprenigi al la lernanto la problemojn ĉe lego de ideogramoj, ni konsideru la sekvantajn du 下女. Japano tuj ekvidos, ke tiu ĉi temas pri kombino — kvankam la presmaniero tion ne montras; li fulmorapide pripensas, ge 下 ŝita (mal-supra) kaj 女 on'na (virino) ne donas japanan vorton, do la «Kun» elparolo ne taŭgas: 下 GE kaj 女 ĜO donas vorton GEĜO (servistino), tial 下女 devas esti legata kiel regula kombino kun «On» elparolo! Fremdulo devas aŭtomate ellerni ĉiujn kombinojn, ĉar al li mankas japana «instinkto». Bonvolu lerni parkere la regulajn kombinojn en la sekva tabelo:

Kombino	Signifo	Elparolo «Kun»	Elparolo «On»
本人	li (ŝi) mem — identa persono		HON-NIN
電車	elektra veturilo		DEN-ŜA
毎日	ĉiutage	mai-niĉi	
出口	el-iro	de-guĉi	
入口	en-iro	iri-gruĉi	

Nota. Kelkaj regulaj kombinoj povas esti legataj laŭ du manieroj; la senco kompreneble ŝanĝiĝas! Ekz. 三月 SAN-GACU (tria monato, marto) micuki (tri monatoj)

Neregulaj Kombinoj:

1. «Kun» kaj «On» mikse legataj. Ekzemple: 手本. 手 te (mano) kaj 本 HON (libro) — signifo: modelo.

La problemoj estas ankoraŭ pli komplikaj ol oni ĝisnun pensas, ĉar multaj ideogramoj havas plurajn «On» elparolojn, kaj la sama ideogramo povas havi diversajn signifojn. La kaŭzo de tiu konfuzo estas, ke la sama ideogramo estis iam enkondukata el du aŭ tri diversaj partoj de Ĉinujo, en du aŭ tri sinsekvaj epokoj, kun malsamaj elparoloj kaj sencoj. Oni povas resume diri ke la «On» elparoloj ĉiam havas la signifon de la «Kun» elparoloj kaj krome ofte ankoraŭ aliajn specialajn signifojn. Ekzemple 本 HON signifas libron kaj ankaŭ aliajn aferojn sed neniu «Kun» elparolo estas por la ideo de libro.

Atentigo: Niaj klarigoj eble ne estas ĉiam historie ekzaktaj. La origino de la ideogramoj ne ĉiam estas konata. Niaj rimarkoj estas direktataj al la moderna kaj praktika lernanto de la japana lingvo, ne al la scienculo.

Ekipita de iom da kono pri skribado, la komencanto nun povas sin turni pli libere al la studo de l' gramatiko. En nia sekva leciono ni rekomencos do la studadon de la parolata japana lingvo moderna. Bonvolu ripeti la tutan kurson, de la komenco!

Fine ni montras la silabaron «hiragana» kiun oni povas laŭvole uzi anstataŭ «katakana»:

あ a	い i	う u	え e	お o
か ka	き ki	く ku	け ke	こ ko
さ sa	し si	す su	せ se	そ so
た ta	ち ĉi	つ cu	て te	と to
な na	に ni	ぬ nu	ね ne	の no
は ha	ひ hi	ふ hu(fu)	へ he	ほ ho
ま ma	み mi	む mu	め me	も mo
や ja	い i	ゆ ju	え e	よ jo
ら ra	り ri	る ru	れ re	ろ ro
わ ŭa	ゐ i	う u	ゑ e	を o
ん n				

Recenzoj

★ La Dia Pesto de Johan Most; elgermanigis Seman Tarano. Eldonita de D-ro Tobias Sigel 2916 E. Grand Boulevard, Detroit, Mich., Usono, 1932. 23paĝa broŝureto, prezo nemontrita.

Plaĉa stilo sed ne mankas kelkaj eraretoj. Kio estas, ekzemple: Futzliputzli (p. 5.), diktato (p. 8), Habel (p. 9), trakajtra (p. 21) kaj malbeno (p. 23)? «Somnambas» (p. 5) montras, ke la tradukinto miskomprenis la naturon de la radiko «Somnambulo» kiu ne estas kunmetita kun «ulo»! Sur p. 6-7 troviĝas eĉ sintaksa eraro (ĝi estis prosperita). Certe la lasta kaj balbeno (malbeno) estas preseraroj.

La enhavo konsistas el la kutimaj popolsciencaj atakoj kontraŭ Dio kaj religio. Sed en tiu ĉi broŝuro oni tute speciale atakas la «hebreo-kristanan teologion» pri kiu ni ne okupiĝas. Estus facile respondi al la diversaj demandoj de l' aŭtoro pri la naturo de Dio, sed ni bone scias, ke estas neeble konvinki partiajn homojn per argumentoj, ni nur perdus nian tempon se ni provus. Mallonge, kvankam la lingvaĵo estas sufiĉe bona, la doktrina enhavo estas ne nur e-ara sed troviĝas pli da insultvortoj ol bona eduko ŝajnas permesi. Sinceraĵe atestoj devus uzi pli noblajn armilojn ol insultojn. M. P.

★ Poemaro el Hungarlando (Hungaraj Poetoj de la XVIa jarcento ĝis niaj tagoj). Esperantigis: Francisko Szilágyi. Eldono de la «Vajda János» Literatura Societo, Budapest, 1929. 95 paĝoj. Tiu ĉi provo de hungara antologio estas tre utila por kiu volas ekkoni la evoluon de l' hungara poezio. La ekstera formo — bindo, papero, kompostado — estas primitivaj, sed la enhavo bona. Unu originala poemo de Szilágyi mem modeste sin kaŝas eĉ l' fino. Mankas bi grafiaj notoj kaj aliaj klarigoj pri la diversaj aŭtoroj. Rimarkinde estas la melankolia, ofte pesimisma tono de la hungaraj poetoj. Sed eble ĉiunaciaj versfarantoj preferas kanti pri doloro, trompo, seniluziigo ol pri feliĉo, rido kaj ĝojo... Ni rekomendas la verkon al ĉiuj legantoj! J. M.

★ Esperanto Lehrbuch, aŭtor-nomo nemontrita, 96 paĝoj, tole bindita, eldono de LEA, Arbeiter Esperanto-Bund, Berlin C25, Dirksenstrasse 42, prezo 1 germ. marko. Sur la titolpaĝo oni presis dike «laŭ gramatika metodo». Tia deklaro sur lernolibro eldonita de laborista rondo ŝajnas al ni vera anakronismo. La tendenco de nia epoko estas la Rekta Metodo. Malgraŭ la klasbatalaj ekzercoj tiu ĉi lernolibro sekvas la malnovan vojon de l' rutino. Tamen, la desegnaĵoj — cetero tre artiste presitaj — montras,

ke la libro ne estas absolute gramatika, sed kompromiso inter la du skoloj. Tial ni povas ĝin rekomendi al germanlingvanoj — kaj al studentoj de l' germana lingvo en eksterlando. M. P.

★ De Viandmanĝado al senvenena Dolĉfrukta Dieto, de G. W. Barnert, elgermanigis Karl Froding, eldono de la Amerika Esp.-Instituto, Madison, Wis., Usono, 16 paĝoj, broŝ., prezo dolaro 0.10. Tiu ĉi verketo estas tradukita en tute senriproĉan Esperanton kaj la enhavo estas ĝeneralinteresa. Kvankam sub modernaj kondiĉoj ŝajnas al ni tute malfacile praktike sekvi la konsilojn de l' aŭtoro, ni varme rekomendas al la publiko trastuĉon de tiu ĉi broŝuro ĉar oni ĝenerale sekvas dieton tute senlogikan, eĉ malsanigan. J. Major

★ K. Kalocsay — G. Warinien: Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro. Verko pri la Esperanta poezio. Ĉapitroj: Skizoj de la Esperanta metriko. — La arto poetika. — Esperanta Rimaro. — Poezia Fakvortaro. — Formato 20 x 13,5 cm. 175 paĝoj, sur senligna papero. Eldonis Literatura Mondo, Budapest, prezo bind. 1,—broŝ. 0,70 usonaj dolaroj. Aldonu 10% por sendkostoj.

Pro la translokiĝo de nia Redakcio al Japanujo ni bedaŭrinde malfruiĝis pri ĉiuj laboroj kaj nia recenzo pri tiu ĉi grava verko ankaŭ konsekvence aperas tro malfrue. La Esperantistaro jam legis de la diversajn recenzajn en nia Gazetaro kaj povis konstati ke unuanime oni cenzuras la troan reformemon de la aŭtoroj. De la «burĝaj» gazetoj al la «klasbatalaj» oni aŭdigas protestajn voĉojn. «La Socialisto» (8a jaro, 1-a numero) ekzemple publikigas tre fortan artikolon kontraŭ la reform-proponoj de L. M. «The British Esperantist» (Januaro) publikigas detalan analizon el la plumo de la bonekonata kritikisto M. C. Butler. Al ĉiuj, kiuj volas detale okupiĝi pri tiu ĉi problemo, ni rekomendas legi lian tre valoran studon. Ĉar en la estinto ni donis multe da spaco al la recenzo de la eldonaĵoj de L. M., estas al ni neeble motivi tie ĉi nian malvarman entuziasmon por la unua Poetiko aperinta en Esperanto. Ni nur volas atentigi pri la fakto, ke la japana poezio povis atingi tre altan gradon de perfekteco sen iaj rimoj. Ekzistas multaj aliaj rimedoj de pura poezio ol la rimedo de rimoj. La nua recenzata verko tro gravigas la demandon pri rimoj kaj neglektas diversajn problemojn de ĝenerala poetiko, estetiko, unuvorte oni volas anstataŭigi ideojn per vortoj... kiuj rimas. M. P.

Revuo de l' Revuoj

- ★ Internaciaj Esperanto-gazetoj: Esperanto de UEA, Nov. Laŭ artikolo de E. Privat, UEA evidente ne volas cedi al la naciaj societoj kaj eble ni havos ne nur plurajn «ruĝajn» sed ankaŭ du «burĝajn» internaciajn asociojn. Belan ekzemplon ni ja montras al la batalema homaro! En la sama numero, en respondo al kritikoj de Teo Jung, ĉefredaktoro de HEROLDO, estas skribite, ke redaktoro de semajna gazeto ne estas «respondeca persono». Ni konfesas, ke ni ne komprenas.
- ★ Literatura Mondo, Dec. «Ĉeĥoslovaka numero» kun belaj ilustraĵoj, kiuj fakte rilatas al la teksto. Pri la enhavo ni nenion diros tie ĉi ĉar en la lasta tempo ni jam detale recenzis L. M. kaj ni volas eviti akuzojn pri particeo.
- ★ Heroldo de Esperanto ĉiam meritas la nomon «semajna, sendependa organo de la Esperanto movado uniuersala, ilustrita». De 13 jaroj ĝi aperadas kun rimarkinda reguleco kaj vere interesa enhavo, belege presita per linotipo, kun diversaj aldonoj, ofte koloraj. La sole kritikebla punkto estas la troa uzo de vortoj netroveblaj en vortaroj — ni konsilas, ke la redakcio klarigu tiujn neologismojn ĉe la fino de ĉiu numero.
- ★ Fluganta Skribilo, Stenografa fakgazeto aperanta jam de 20 jaroj, pri kiu la «Utrechta Esperantisto» prave skribas en sia septembra numero: «Inter la diversaj sistemoj de Esperanta stenografo, certe tiu de Duploye Hlageul meritas plej multan atenton. Ĝi jam pruvis sian uzeblecon dum multaj jaroj kaj fariĝis sufiĉe konata».
- ★ La Interligilo de l' P.T.T. Okt. Kvar poemoj en la komenco neniel rilatas al poŝto aŭ telegramo. Enhavas kontraŭjapanan artikolon verkitan de Ĉino. Tia tendenca skribaĵo ne taŭgas por teknika gazeto.
- ★ La juna batalanto, organo de katolika junularo, Sept. Ni memorigas al niaj junaj samideanoj la dirojn de Kristo pri la trabo en la propra okulo...
- ★ La Esperanta Gazeto, Amsterdam, 2a jaro 38a numero «aperas ĉiusemajne». Enhavo politika, ekonomia.
- ★ Tutmondo Esperanta «monata revuo amuza kaj sciiga» n. I Karlsruhe, Germanujo, Januaro. Jen nova gazeto! Bonan sukceson, en la krizo.
- ★ Internaciisto, Okt. Same mudiinteresa ripetado pri furorvortoj kaj eĉ insultoj kiel kutime. La malvasta horizonto de l' redaktantoj akre kontrastas al la titolo.
- ★ La Socialisto, Jan. Jen interesa ekzemplo pri kooperado inter kvar naciaj laboristaj asocioj — sed kial ne tuj fari internacian gazeton?
- ★ Minaraten, danlingva revuo, kiu multe klopodas por Esperanto. La Dec. n-ro enhavas portreton de D-ro L. L. Zamenhof kun artikolo.
- ★ La Revue Spirite, Paris. Dec. «Journal d' Etudes Psychologiques et de Spiritualisme expérimental.»
- ★ Neugeist, Die Weisse Fahne, germanlingva, monata revuo de nia fratmovado en Germanujo. La Jan. n-ro enhavas rimarkindajn artikolojn pri orienta spiritualismo.
- ★ Der Freidenker germanlingva organo de l' asocio de l' germanaj liberpensuloj, dusemajna.
- ★ Hungara Heroldo, monata, 5a jaro, Nov. ★ La Suda Kruco, Aŭstralio, 13a jaro, aperas de nun sur duoble granda formato (Nova serio). Bonŝancon!
- ★ La Movado, Parizo. Nov-dec. Ilustrita, franca-Esp, altnivela revuo, eĉ internacie rekomendinda.
- ★ The British Esperantist, Jan. Detalaj, valoraj recenzoj, precipe pri Parnasa Gvidlibro de K. Kalocsay kaj G. Waringhien, verkita de la bonekonata M. C. Butler.
- ★ L' Esperanto itallingva propaganda organo, 19a jaro. La decembra numero enhavas tre interesan artikolon pri la Esp. stenografo.
- ★ Laborista Esp-isto, nederlanda, Dec. ★ Utrechta Esp-isto, monata organo klare multobligita. En Nov. n-ro troviĝas internacie legindaj artikoloj pri «legu pli multe» de B. D. kaj «Neologismoj» de Joh. Hartog kun kritikoj pri certaj bonekonataj verkoj, la Ĉeĥ-metodo kaj aliaj fetiĉoj de nia movado.
- ★ Esperanto Lernanto nova monata eldono de la Japana Esp. Instituto, Tokio n-ro I, 2. La «gazeta inflacio» menciita en Heroldo alvenis ankaŭ al Japanujo. Tiu ĉi gazeto, same kiel Verda Mondo estas intencita por komencantoj en Japanujo. La sola punkto per kiu la nova eldonaĵo malsuperas Verdan Mondon estas, ke ĝi enhavas tro da klarigoj per japana skribo kaj nesufiĉe da Esp-aj tekstoj. Ni deziras bonan ŝancon! ★ La Revuo Orienta, Tokio, aperas de 14 jaroj, monata. Esperantologio fariĝis la specialaĵo de tiu ĉi gazeto, precipe redaktita por Japanoj. Tamen, artikoloj pri japana mitologio, k.a. estas internacie legeblaj.

Oomoto Kroniko

★ De la komenco de la malfeliĉa okazintaĵo en Manĉurio, U.H.A. ekprenis sur sin la sanktan rolon enradikigi la belan floran de bonamo, kune kun la Ruĝsvastika Asocio. Lastatempe naskiĝis la nova ŝtato Manĉukuo, sed tamen ĝis nun ĝi ne estas tre trankvila, ĉar ekzistas interalie la grava problemo de l' banditoj, kiuj ĉiam minacas kaj turmentas la honestan loĝantaron. Pro tio la japana garnizono estas devigata konstante restadi por gardi la loĝantaron kaj ĝiajn posedaĵojn. Lastatempe U.H.A. laŭ la permeso de la japana armeo sekvigis sep junajn membrojn post la trupoj. Kompreneble ilia misio ne estas ĉe la fronta linio, sed sekvante la armeon ili sin okupas pri zorgado al kompatindaj vilaĝanoj, flegado al vunditoj, ktp. Inter ili troviĝas ankaŭ S-ro J. Nišimura, pri kiu niaj karaj legantoj jam bone scias, ke li ĝis antaŭ iom da tempo estis inter ni en nia redakcejo. Laŭ la ricevita informo ili ekiris de Mukdeno la 12-an de Dec. kaj nun marŝadas pli kaj pli malproksimen spite al neĝo, tranĉa malvarmego kaj kugloj.

★ La 14-an de Dec. S-ro Takateru Kitamura, nia propagandisto speciale sendita al Ĉinujo, revenis al Kameoka post duonjara sukcesplena vojaĝo. Dum sia vojaĝo tra la granda kontinento de Azio li sindone klopodis por la interfratigo de aziaj gentoj. En Ŝanhajo kaj Ĉinan li partoprenis la 12-an Kongreson de la Ruĝsvastika Asocio reprezentante nian movadon. Dum la Kongreso li estis elektita vicprezidanto. Krom tio li faris tre signifoplenan kontaktingon kun aŭtoritatuloj kaj eminentuloj kaj interkonsiligis pri gravaj aferoj. Li estas tute konvinkita ke la paca regno en Manĉukuo estas efektigebla nur dank' al la japana justeco kaj la ideo de U.H.A. Reveninte hejmen la 14-an de Dec., apenaŭ unu monato forpasis pro arango pri estonta pli vigla movado kaj li denove ekveturis al Ĉinujo la 12-an de Jan., akompanate de du junuloj, kiuj ankaŭ tie klopodos por la komuna afero.

★ La 15-a de Jan. S-ro Porotikoff, rusa oficiro kaj prezidanto de la Siberia Asocio alvenis tie ĉi akompanate de interpretisto S-ro N. Sato. Li estas jam delonge konvinkita, ke UHA havas la plej altan ideo-

lon kaj nur per tio oni povas doni lumon al la rusa rifugantaro. Li intencas eldoni ruslingvajn Oomoto-librojn kaj nun estas okupata por traduki klarigojn pri la doktrino, historio kaj bibliografioj de la Fondintino kaj la Majstro. Krom tio en Harbino li havas je sia dispozo «Kung Pao», (grava organo de la rusa rifugantaro), kiun utiligante li intencas publikigi iom post iom diversajn artikolojn pri nia movado kaj tiamaniere propagandi nian ideon inter ili. Sekve per sia ĉi-foja vizito li celis profunde ekkoni la esencon de Oomoto kaj UHA por ke li povu komenci pli viglan agadon post sia hejmeniro, alte tenante la standardon de UHA. Nia redakcio do varme akceptis lin kaj por klarigi al li ĉiujn faritajn demandojn, niaj fakanoj prenis sur sin la rolon de klariganto dum sia kelktaga restado. Li konstante preparis manuskriptojn en la rusa lingvo, aŭskultante klarigojn, vizitante multajn Oomoto-konstruaĵojn kaj Ekspozicion, eĉ ĝis malfrua nokto. En «Taiŝo-den» (paroladejo en Kameoka) kaj aliaj Oomoto-domoj li paroladis antaŭ granda aŭskultantaro veninta el ĉiuj partoj de la lando por Oomoto-kurso. La 18-an li vizitis al Ajabe kaj kun nova espero kaj refreŝigita entuziasmo forveturis al Tokio.

★ La 28-an de Jan. nia ĉefredaktoro, S-ro Koogecu Nišimura revenis al Kameoka en bona sano. Lin bonvenigis granda amaso da Oomotanoj ĉe la stacidomo.

★ Nia movado en Manĉukuo pli kaj pli vigliĝas kiel ankaŭ nia amika interrilato kun Tao Juan (Ruĝsvastika Asocio). Pro tio ĝisnun estas senditaj multaj Oomotojunuloj kaj tiun ĉi fojon S-ro Isao Inoue, kunlaboranto en la redakcio de «Verda Mondo», ekveturis al Manĉukuo. Li klopodos tie por nia Esp.-movado.

★ La 29-an de Jan., la famekonata Esperantisto, Prof. Ĉikao Fuĝisaŭa, kiu estis en Eŭropo dum kelkaj jaroj, vizitis nin en nia Teritorio kaj samideane interŝanĝis opiniojn pri la spirita kulturo. Li estis tre ĝoja trovi, ke siaj ideoj kaj la niaj multe similas kaj li multe simpatiis al nia movado. La sekvan tagon vespere li veturis al Oosaka. Li estas nun en la Oficejo de la Japana Spirita Kulturo en la Eduka Ministrejo kaj li estas eminenta eksperto pri la orienta filozofio.

DOMO DE HOMAMO

Vere grandioza domo de la tutmonda Esperantistaro estas la Domo de Homamo, estrepremita de Universala Homama Asocio. Ĝi estos konstruita en la centra parto de Eŭropo per la granda sumo de 200,000 pundoj kaj Esperanto estos la sola oficiala lingvo en ĝi. Kelkcentoj da sinceraj Esperantistoj el 31 landoj jam sendis sian brikon por la Domo. Ĝi havas plenan subtenon de U.H.A., kiu oferos grandan parton de la elspezoj por la konstruo.

Se vi ankoraŭ ne scias pri tia epokfaranta konstruaĵo, tuj sendu 1 internacian resp. kuponon al U.H.A.-Centro, Kameoka kaj vi ricevos 14-paĝan broŝuron, kiu donos al vi detalan informon pri la Domo.

La **Domo de Homamo** ricevis de gesinjoroj: C.A.A.Haccou, Soerabaia, N-Hindujo, 25 fr.fr.; Emil kreibich, Ŝelezarny, Ĉeĥoslovakujo, 50 fr.fr.; Ludwig Merkel, Ahlen, Germanujo, 60 fr.fr.; M. Taguĉi, Okajama, Japanujo, 1.30 yen; (ĉiuj sekvaj gesinjoroj estas en Ŝimane-prefektejo, Japanujo) H.Ŝibuja, Nonami, 1 yen; K.Aoki, Taiŝa, 1 yen; M.Iŭatani, Hane, 50 sen; Ĉ.Kato, Ogaki, 1.10 yen; S.Esumi, Honjo, 30 sen; T.Adaĉi, Tanemura, 50 sen; K.Hutasegaŭa, Ezu, 5 yen; T.Masuno, Masuda, 1.35 yen; K.Macuura, Asakimi, 1.80 yen; H.Jasumoto Ŝoonan, 1.30 yen; D.Huruhiki, Toriki, 2 yen; K.Moriŭaki, Imbe, 30 sen; G.Nagatani, Kunimori, 90 sen; O.Inoue, Ŝiĉirui 80 sen; A.Hikino, Moĉida, 50 sen; S.Hosoda, Jaoĉi, 80 sen; T.Minami, Tomoo, 2.50 yen; K.Izuka, Nogi, 10 sen; Ŝ.Kurokaŭa, Kaiĉo, 75 sen; H.Iŝitobi, Hurue, 60 sen; K.Sasaki, Macue, 60 sen; S.Nakaŝima, Cukiteru, 1 yen; J.Iŭatani, Asajama, 4.40 yen; Macuefilio, 1.50 yen.

Entute 27-a listo, 135 fr.fr. kaj 31.90 yen. Kore dankas

OOMOTO INTERNACIA

Ĉiam pensu pri la Domo de Homamo, propagandu pri ĝi. Al ĉiu donacinto de 100 fr.fr. por la Domo de Homamo ni donacas la belan libron «Sinjoro Laŭdata».

Kian ajn sumon ni akceptas kun plej granda danko. Bonvolu sendi vian brikon al Universala Homama Asocio, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

El la Redakcio

— Pro diversaj malhelpoj kaŭzitaj de translokigo de nia Pariza Oficejo kaj la kuniĝo de niaj du organoj, tiu ĉi januara numero tre malfrue aperis. Pro tio ni elkore petas pardonon de nia Legantaro. Ni do rapidigos eldoni la sekvajn numerojn kaj post kelkaj monatoj nia gazeto atingos al vi pli frue.

— Antaŭa O. I. en Parizo aperis ĝis Novembro (n-ro 71, jaro VII) kaj OOMOTO en Kameoka ĝis Decembro (n-ro 88, VIII). La numero de la nova serio de OOMOTO INTERNACIA sekvas tiun de «Oomoto», kiel vi vidas sur la titolpaĝo.

— Ĉe la Novjaro niaj samideanoj sendis al ni gratulajn salutojn. Elkoran dankon! Al ili ni same esprimas tie ĉi niajn sincerajn bondezirojn. Nia saluto venas al vi malfrue, tamen niaj karaj legantoj bonvolu scii, ke la 1-a de Aprilo estas ĝuste la 1-a tago de Nova Jaro en Siano (laŭ la raporto de nia propagandisto S-ro K. Kakchi en Bangkokk).

— La 29an de Januaro nia fervora kunlaboranto S-ro Kacuo Osaki edziĝis. Ankaŭ lia edzino laboris por Oomoto-Movado en la Teritorio de Kameoka. Ni esperas mil benojn al la nova kunvivado!

— Ni demandas kritikojn, opiniojn kaj eventuale laŭdojn pri «Oomoto Internacia», en kiu ni publikigos ilin.

Leterkesto

Ni ricevis la abonkotizojn de la jenaj Gesamideanoj: F-ino M. G. Kramers, Apeldoorn, Holando; S-roj Aimé Sandelyon, Lyon, Francujo; Hans Roemer, Blankenheim, Germanujo; F-ino Iida Sairanen, Savonlinna, Finnlando; S-ro George Mell, Darlington, Anglujo; Dimitr Borisov, Pleven, Bulgarujo; Josef Kulhanek, Erbach, Saar; Karl Fischer, Danzig; Paul Tarnow, Dusseldorf-Oberkassel, Germanujo; Tore Halleström, Vingaker, Svedujo; A. Hullin, Honfleur, Francujo; Paul Letinois, Barberaz, Francujo; Otto Apelt, Frankfurt a.d.O., Germanujo (1932-1937); I. Stenhofe, Mansfield, Anglujo.

Al ĉiuj koran dankon!

Oomoto Internacia pli prosperos dank' al la sinofero de fidelaj adeptoj de Universala Homama Asocio. Ankaŭ vi subtenu ĝin sendante la abonkotizon de 1 us. dolaro. Malnovaj abonantoj! bonvolu rapide renovigi vian abonon.

Enhavo

Kovrilo — desegnaĵo de la Majstro O. Deguĉi.	Japanana Legendo: Ruĝa vizaĝo de dio	18
Saluto al la Esp-istaro	Psikologio (7)	20
okaze de mia reveno al Japanujo	Epizodo de Pivivo	22
Rabindranath Tagore kaj Japanujo	Poemoj: Diferenco, Kreado	23
Ombrelaj	Per Esperanto tra Japanujo (10)	24
Vidu la faktojn pri Ĉiuujo kaj Manĉukuo	Kelkaj notoj pri la Aŭstrialiaj Indiĝenoj	26
Sankta Skribo de Oomoto-Fondintino Nao Deguĉi	Respondo el Japanujo	28
Tagiĝas	Japanana Lingvo por Esperantistoj (7)	29
Impreso pri la Japanana Virino	Recenzoj	30
Al la Mondo de Bonamo	Revuo de l' Revuoj	31
El la Japanana Literaturaĵo «Kusamakura»	Oomoto Kroniko	32
Fonografo	Domo de Homamo	33

Atenu! Grava!

Kurso de Japanana Lingvo, Psikologio, Vojaĝ-raportoj, ktp. estas daŭrigoj el «OOMOTO».

Ĉiu abonanto al Oomoto Internacia kiu pagis sian kotizon por 1933 rajtas ricevi duon-preze la jarkolekton por 1932 de «Oomoto». Tio estas nepre neceso por plene kompreni la daŭriĝojn!

Mendu tuj sendante dol. 0.50 al ni.

(La decembra numero ni ne povas garantii, okaze de elĉerpigo ni ĝin anstataŭigos per alia broŝuro).

★ Korespondo

Ĉeĥoslovakujo: S-ro Fr. Pytloun (Del. de UEA), Bakov nad Jiz., deziras dum somero 1933 ekspozicii esperantajn gazetojn kaj eĉ naciajn en Gazetaro-Ekspozicio kaj petas samideanojn, ke ili skribu kaj sendu materialojn. Ĉiu estos nepre rekompencata per bela ilustrita poŝtkarto aŭ fotografaĵo.

Germanujo: 20 esperantistoj deziras korespondi kun gesamideanoj de Orientlandoj per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝangi gazetojn ktp. Ni certe respondos. Skribu al Franz Kipka, Kürtenstr. 144. Düsseldorf, Germanujo.

Finnlando: Instruisto Svante Kivinen, Kouvola Finnlando, volas interŝangi poŝtkartojn ilustr. por instruado de geografio.

Japanujo: S-ro T. Kakiuĉi, 16 Zooĉo, Niŝikuĝo, Kioto, Japanujo deziras korespondi poŝtkarte kaj letere, interŝangi portretojn kun ĉiulandaj gesamideanoj. Mi sendos bildojn de Japanana moro.

★ INTERŜANĜO

Ni interŝangas reklamon kun tutmondaj Esp-aj gazetejoj kaj ĵurnalejoj. Tiuj, kiuj volas tion fari, tuj sin turnu al ni kun siaj reklamtekstoj kaj specimena gazeto. Ni estas ĉiam pretaj por reciproka servo.

La Redakcio

NIA TARIFO

Abonkotizo: (afrankite)

Abonanto: 1 usona dolaro, 5 sv.fr., aŭ ĉiu egalvaloro.

Subtenanto: 4 usonaj dolaroj por 5 jaroj.
Dumviva abonanto: 10 usonaj dolaroj.

Reklamo: Tuta pago: 20 sv.fr., duona pago: 10 sv.fr.

Anonceto: 5 linioj — 2 resp.-kup. Por 6 foja enpresado — kvarobla prezo.

Multaj premioj estas dissendataj.

Ĉiu abonanto rajtas enpresigi du senpagajn anoncetojn jare.

La abonkotizon sendu rekte al Oomoto Centra Oficejo, Kameoka.

定價 壹部 貳拾錢	壹ヶ年 貳圓四拾錢
昭和八年三月一日印刷	昭和八年三月一日發行
編輯發行印刷人 御田村龍吉	京都府南桑田郡龜岡町 荒塚字内丸一
印刷發行所 天聲社	(替振大阪75917番) 全



Majstro Onisabro Deguçi en propagandista vestaĵo (1933)

NIAJ REPRESENTANTOJ

Anglujo	S-ro G. Tordoff, 82, Pendennis Parko, Bris- lington, Bristol.	Francujo	S-ro Simon Frantz, 21, rue Alain Chartier, Paris XV.	Italujo	S-ro Luigi Minnaja, Via Calatafimi 10, Roma 21. S-ro Giovanni della Savia, Viale delle Ferriere. 19/II, Udine. S-ro Giulio Matuella, Museo Stoino Guerre, Rovereto (Torento).
Aŭstralia	S-ro L. Thomson, c/Esperanto Society, WEA. Rooms, 449a Pitt Street, Sydney.	Germanujo	S-ro Kurt Wuensche, Augustenstr. 17, Leipzig-R. S-ro Anton A. Ehm, Zittau. Sa., Stefanstr. 11. S-ro Gottlieb Strofner, Munchen S. 50. Bavarujo, Dietramszellestr. 10. 21. S-ro K. O. Schmidt, Brixstr. 8 a, Flensburg. S-ro F. Bachmann, Bahnhofstr. 3/1. Heilbronn.	Jugoslavujo	S-ro Marko Dominis, Split Zminpka Str. No I d.
Aŭstrujo	D-ro Karl Mimler, Hettenkofenstr. 21, WienXVI. S-ro Bernhard Selzer, Ettenreichgasse, 4, 31 Wien X	Hindujo	S-ro Liem Tjong Hie, Semarang, Karangtoeri 66, Java.	Litovujo	S-ro Andrius Borkaskas, Šiauliai g-ve 86, Radviliškis.
Brazilo	S-ro Masajoŝi Kondo, Caixa postal 3594, S. Paulo.	Hispanujo	S-ro Francisko Miralles, Hellin (Albacete). S-ro Salvador Viladelmas, Colon 52-54, Sabadell (Bar- celono).	Novzelando	F-ino Coralie Smythson, 287 Adelaide Rd, Wellington.
Bulgarujo	S-ro Ivan Kirov, Popska, 484 Sliven. S-ro Georgi Dončev, str. officerska 25, Tirnovo. S-ro Atanas Nikolov, str. Car Ivan Ŝisman. 19, Burgas.	Nederlando	F-ino G. de Waart, Box 23, Hilversum.	Persujo	S-ro Darius Nemseči, Tabriz.
Ĉeĥoslovakujo	S-ro Rudolf Burkert, Kalvariengasse 34-IV, Nie- mes. S-ino Sofie Ciperá, Plzen III, Zizkova 52.	Hungarujo	S-ro Paŭlo Balkanyi, Poŝto 507, Budapeŝt.	Polujo	S-ro Adolf Oberrotman, Varsovio, Krak—Przedm 10. S-ro Denysiuk Les, Kolomea.
Danujo	S-ro Harry E. Jensen, Reberbangade 10, Aalborg.	Ĥinujo	S-ro Sh. M. Chun, N.Y.M.S. Lunghuwa, Shanghai.	Svisujo	S-ro Karl Jost, Stolzesstr. 7, Zurich 6.
				Usono	S-ro John Lester Lewine, 150 E. 72 nd. St. New York S-ro K. A. Suzuki, Orange Petroleum Co. Ora- nge (Texas)

Nia Literaturo

Ni atentigas al niaj legantoj pri nia Literaturo:

Kio estas Oomoto?	Prezo aŭfrankita Sv. Fr.
100 paĝoj — ilustrita (4-a eldono en preparo)	1.00
Konturo de Oomoto , 20 paĝoj — 8 bildoj	0.20
Origino de Oomoto — Sankta Vivo de Sinjorino Nao Deguĉi	0.50
Fundamento de Animo , 48 paĝoj	0.50
Klarigo de Kamigakari , 2-a eldono en preparo	0.60
Sinjoro Laŭdata , 200 paĝoj, tole bindita	2.50
What is Oomoto? (anglalingva) 56 paĝoj	0.60
Oomoto , (franclingva) 56 paĝoj	0.60
Domo de Homamo , 14 paĝoj	0.30
La Konfliktoj en Manĉurio kaj Ŝanhajo 60 paĝoj kun bildoj	0.50
Universala Homama Asocio , (Esperanta, angla, franca)	0.10
Oomoto , (germanlingva) eldono de Neugeist, Pfullingen, Germanujo, 32 paĝoj	0.90
Das Reich Gottes auf der Erde , eldono de Rudolf Burkert, Niemes, ĈSR. 32 paĝoj	0.75
Verda Mondo , monata organo de Esp. Propaganda Asocio, Kameoka Jarabono	3.00
Oomoto Internacia , monata organo de Oomoto kaj U.H.A.	Jarabono 5.00

Mendu ĉe:

OOMOTO CENTRA OFICEJO

Kameoka, Kioto-Iu, Japanujo.

“TELEGRAMO”

interesaj, utilaj, variaj
legaĵoj en Esperanto.

Petu senpagan specimenon al:

TELEGRAMO, Plovdiv (Bulgarujo)

La Suda Stelo

organo de la Esperanto Movado en Jugoslavio

estas la plej granda el ĉiuj naciaj
Esp. gazetoj kaj certe meritas
internacian subtenon.

Monata, ilustrita revuo en Es-
peranto, ktp.

Specimenon petu kontraŭ res-
pondkupono

de

S-ro Franjo Homar, redaktoro,
Slavonski Brod, poŝtfako 44,
Jugoslavio.

Kun duobligita enhavo
aperis la dua eldono de

“Sinjoro Laŭdata”

200-paĝa. Tole bindita.

Poemoj, frazoj, prozoj de ĉiulandaj
gesamideanoj, dediĉitaj al
S-ro Onisabro Deguĉi.

Esperante kaj japane.

Prezo : 2.50 sv. fr.

Mendu ĉe: Oomoto Oficejo, Kameoka.

Esperantistoj el ĉiuj landoj, se vi volas
havi bonan kaj samtempe malkaran
legaĵon, abonu la monatan gazeton

FRATECO

jarabono 4 intern. respondkuponoj aŭ 1 sv.fr.

Interfratiĝo de ĉiuj homoj kaj popoloj;
nuligo de ĉiuj reparacioj kaj militŝul-
doj; unuigo de la Tuthomaro en unu
Tutmonda Libera Federacio; forigo de
ĉiuj dogan- kaj ŝtat-limoj; forigo de la
deviga militservo en ĉiuj landoj; plena
senarmigo; malpermeso de armilpro-
duktado; justa distribuo de la vivri-
medoj; libera, kristana komunismo;
racia, laŭnatura vivado; sensanga, ve-
getara nutrado; profunda okulta kono
pri la naturo de la homo kaj de la
Universo -- jen niaj celoj, niaj ideoj
kaj idealoj, por kies realigo laboros
«FRATECO».

Samideanoj, helpu nian iniciaton! Ĝi
estas por la bono de la Tuthomaro.

Adreso: «FRATECO»,
poŝtkesto 6. Burgas, Bulgarujo.

Petu senpagan specimenon de

Internacia Medicina Revuo

ĉar la oficiala organo de

Tutmonda

Esperantista Kuracista Asocio

bezonas vian subtenon.

Ĝi estas la sola pure scienca gaze-
to en Esperanto.

Redakcio kaj administracio:

19, Avenue Montjoie, Uccle 3
(Belgujo).

Jarabono:

Unu usona dolaro aŭ egalvaloro

Poŝtĉekkonto: 2814 51 Bruselo.

La pliperfektigita

HEROLDO

trovas la aplaŭdon de ĉiu abo-
nanto. Ĉu vi jam vidis numeron
el 1933? Se ne, petu senpagan
specimenon. Pli bone estas, se vi
mendas provabonon por unu mo-
nato je la prezo de 0.80 gmk.
Dum tuta monato vi havos oka-
zon, prijuĝi la semajnan organon
de la Esperanto-Movado. Sam-
tempe postulu katalogojn pri Es-
peranto-literaturo.

Mendu ĉe la Administracio de

Heroldo de Esperanto

Brusseler Str. 94, Koln, Germanujo.

